# juna amiko

majo 2019 • n-ro 2/2019 (159)




*Ferii kaj lerni:* Ni iru al SES!
*Konversaciaj temoj:* Ĉu somerumi apud la maro?
*NATURE:* Kameloj. *LUDE:* Amikon montras malfeliĉo. *Nia sano:* Ŝparu viajn orelojn!
*Interkultura Mondo:* Esperanto-Numismatika Asocio.
*Fabelo:* Kolora mondo. *LASTE:* Krucenigmo pri Serbio.

PROGRESIGA REVUO POR LEGEMULOJ INTER 10- KAJ 100-JARAĜAJ


Klaŭdia
Aŭtorino: Sonmy Álvarez Tradukisto:José de J Campos
Por Sonmy
Peĉjo, ni ekludu.
Ajjjj!
Ha, ha, pardonu min
Ni daŭrigos la ludon.
Hm... tio doloris.
Senkulpigu min, amiko
Ek do!
Klaŭdia, la amikoj respektas kaj protektas unu la alian. Ĉu ne?
Jes, se la amiko de Peĉjo daŭrigas tiel, li restos sen amikoj.
Nee!

# Enhavo

**Enkonduke:** Karaj amikoj! (Stano Marček, SK); Karaj legantoj! (Mireille Grosjean, CH) ..... 4

**Konversaciaj temoj:** Ĉu somerumi apud la maro, aŭ ne? (Judit Fel-szeghy, HU) ..... 5



**Humuro:** Mia vivo ĉe Fejsbuko (Renée Triolle, FR) ..... 10

**LUME:** El mia kolora vivo (Pavel Rak, CZ) ..... 10

**Nature:** Kameloj (José de J. Campos Pacheco, CU) ..... 11



**Konkurso:** Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj (Aranka Laslo, RS) ..... 13

**LUDE, la unika dua etaĝo:** Amikon montras malfeliĉo (Mónika Molnár, CH) ..... 14

**Nia sano:** Ŝparu viajn orelojn! (Renée Triolle, FR ..... 16

**Fabelo:** Kolora mondo (José de J. Campos Pacheco, CU) ..... 18



**Recenzo:** Kie troviĝas la mistera insulo? (Luiza Carol, IL) ..... 21

**Legu librojn – premioj – konkursoj:** Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo: Belgio. (Małgosia Komarnicka, PL) ..... 22

**Ideo:** Kiom stultan ideon mi havis... (Mireille Grosjean, CH) ..... 27

**Kantu kun *Juna Amiko*:** *"Vent' printempa kirlas akvon"* (Małgosia Komarnicka, PL/ Maria Eszes, HU) ..... 28

**Interkultura Mondo:** Esperanto-Numismatika Asocio (Elena Nadikova, Rert Boon, BE) ..... 30

Maljunulino en tramo (Honoré Sebuhoro, CD) ..... 32

**Inventoj:** Virinoj inventis (Renée Triolle, FR) ..... 33

**Ferii kaj lerni:** Kion ni faru somere? Ni iru al SES! (Michal Grodza, SK) ..... 35

**LASTE, la tria etaĝo:** Krucenigmo pri Serbio. Serbio, la kongreslando de ILEI (Stefan MacGill, NL/HU; Radojica Petroviĉ, RS) ..... 37

Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko* ..... 39

**Eldonanto** de *Juna amiko*: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Jura sidejo: Centra Oficejo de UEA, Roterdamo, Nederlando. **Retejo:** sub rekonstruo ĉe *ilei.mondo.info*. Ĉefaj informoj pri *Juna Amiko*: *http://ilei.info/revuoj/?lingvo=eo*. Historio de la revuo: *http://eo.wikipedia.org/wiki/Juna_Amiko*. La numeroj de 0 ĝis 138 (1972 ĝis 2014) estas publike legeblaj ĉe: *http://www.eventoj.hu/juna-amiko/*. Vidu ankaŭ *lernu.net* kaj *edukado.net*. **Redaktoro:** Stano Marček (Zvolenská 15/21, SK 036 01 Martin, Slovakio), *stano.marcek@gmail.com* aŭ *redakcio@gmail.com*. **Lingvaj reviziantoj:** Karine Arakeljan (Armenio), Doi Ĉieko (Japanio), Utho Maier (Germanio) kaj Rob Moerbeek (Nederlando). **Rubrikestroj:** Judit Felszeghy, Stefan MacGill (ambaŭ el Hungario), Małgosia Komarnicka (Pollando), Mónika Molnár (Svislando), Elena Nadikova (Rusio), Luiza Carol (Israelo). **Kunlaboranto:** Raita Pyhälä (FI). Presita en Slovakio. **Administranto:** Sebastian Cyprych, *ilei.oficejo@gmail.com*. **Landaj Perantoj** sur la p. 39. La sekva numero aperos en septembro 2019. **Limdatoj por sendi kontribuaĵojn:** ĝis la fino de januaro, aprilo, aŭgusto kaj oktobro. **Jarabono** € 18 en tiel nomataj A-landoj kaj € 13 en B-landoj, laŭ la kategorioj de UEA (€ 15 kaj € 12 por mendo de 3 aŭ pli da ekzempleroj al la sama adreso).

**ISSN 0230 1318**

# Karaj amikoj!



Bonvenon en la maja numero de *Juna Amiko*! Atendas vin planoj por apudmara somerumado en la rubriko *Konversaciaj temoj*, konatiĝo kun kameloj en la rubriko *NATURE*; ŝpari viajn orelojn vi lernos en la rubriko *Nia sano*. Via mondo nun fariĝos pli kolora danke al la rubriko *LUME* kaj la fabelo *Kolora mondo*. Ĉu vi scias, ke amikon montras malfeliĉo? Vi legos pri tio kaj ĝuos belajn bildojn en la rubriko *LUDE*.

Pri interesaj libroj vi ekscios en la rubrikoj *Recenzoj* kaj *Legu kaj ĝuu*...

Ĉu vi aŭdis pri la fama verkisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj? En la serba urbo Subotica okazis pri li konkurso kaj impona ekspozicio kun literaturaĵoj, pentraĵoj kaj fotoj. Ĉu vi volas gustumi belgajn pralinojn, ekkoni Belgion kaj fari konkurson pri tiu belega reĝlando? Vi povas fari tion en la rubriko *Ekkonu nian landon pere de ĝia legendo.*

Inter esperantistoj ekzistas ankaŭ homoj, kiuj kolektas Esperantajn monerojn kaj medalojn. Pri ili vi legos en la rubriko *Interkultura Mondo*. Vi povos denove ankaŭ kanti kun *Juna Amiko* – la hungaran popolan kanton *Vent' printempa kirlas kanton*, tradukitan al Esperanto, ekscii pri inventoj de saĝaj virinoj en la rubriko *Inventoj,* amuziĝi ĉe bildstrioj kaj humuraĵoj...

– Cetere, kion vi faros ĉi-somere? Ĉu vi eble iros ferii kaj lerni Esperanton en Somera Esperanto-Studado en Slovakio?

Kun la nuna numero de *Juna Amiko* vi denove povos solvi krucenigmon kaj konatiĝi kun Serbio en la rubriko *LASTE*.

Agrablan legadon, karaj junaj amikoj!

Via redaktoro

**Stano Marček**

# Karaj legantoj!



Por vojaĝi, iu persono devas havi libertempon, monon, kaj eblon akiri vizon por eniri iun vizitindan landon. Multaj obstakloj baras la vojon. Ne facila afero! Tamen eblas vojaĝi, legante tiun ĉi numeron de via ŝatata revuo *Juna Amiko*. Post salto al Benino por ekkoni trinkejon kun stranga nomo, vi povos malkovri Belgion kaj Serbion, sed sekvante la paŝojn de Tibor Sekelj kaj legante liajn verkojn vi malkovros plej diversajn regionojn el tuta Afriko, Ameriko kaj Azio, ĉefe Nepalon. Sed sciu, ke la komenca bildstrio venas el Kubo. Vi povos ekzerci preparante restadon ĉemaran, eĉ se vi ne povos iri al la maro. Eksciante pri kameloj vi migros al diversaj kontinentoj, ĉar tiaj bestoj ekzistas en Azio, Afriko kaj Ameriko. Malkovrante la agadon de inventemaj virinoj vi saltos de loko al loko. Studemuloj certe decidos iri al Slovakio por partopreni en la fama Somera Esperanto-Studado. Kaj aliajn mi mem renkontos en Ĉaĉak, Serbio, okaze de la baldaŭ okazonta 52-a ILEI-Kongreso.

Mi deziras al vi agrablan legadon.

**Mireille Grosjean**

Prezidanto de ILEI

# Ĉu somerumi apud la maro, aŭ ne?

## Help-materialo por progresemuloj. Rubrikestro: Judit Felszeghy.

### I. La neatendita somera plano

**Karla (K) kaj Paŭlo (P), geedza paro, babilas en sia hejmo, komence de marto.**

P – Imagu Karla, de kiu mi ricevis ret-leteron hodiaŭ! Ĉu vi rememoras pri Steĉjo?

K – Steĉjo? … Ne… Kiu Steĉjo?

P – Ho, vi ja certe povas rememori pri li! Li estis mia samklasano en la mezlernejo, kaj ni ofte renkontis nin dum jaroj; li volonte vespermanĝis ĉe ni, aŭ tagmanĝis dum semajnfinoj, ĉar li ege ŝatis viajn rostitajn viandaĵojn kaj supojn!

K – Jes, mi jam rememoras pri li! Li ofte manĝis ĉe ni, sed neniam li alportis almenaŭ botelon da vino. Kio pri li?

P – Do, li sendis al mi leteron, kun multaj bildoj. Li jam loĝas en Belurbo, apud la Blua Maro, en belega vilao.

K – Jes, kaj?

P – Li invitis nin por ripozi ĉe li, en sia moderna kaj luksa familia domo, por dek tagoj! Rigardu la bildojn!

K – Vere mirinda loko! Mi eĉ ne povas imagi, ke ni promenos sur tiu marbordo, trinkos kafon en unu el tiuj elegantaj apudmaraj kafejoj, dum ni aŭskultos la murmuron de la ondoj…

P – Rigardu tiujn montegojn kun neĝaj pintoj norde de la urbo! La maro estas tute proksima, kie la vetero estas ĉiam agrabla. Krome, en la ĝardeno troviĝas granda naĝbaseno; ĉu vi vidas? Imagu, en tiu bela loko ni povos ferii!

K – Jes, kiel en sonĝo! Kiam ni veturu tien?

P – Do, li skribas, ke la lerneja ferio komenciĝas meze de junio, kaj li akceptos nin en la dua parto de junio.

K – Ni havos fin-fine “veran” someran ferion, anstataŭ labori en nia semajnfina domo! Kiamaniere ni veturu tien?

P – Karulino, estas ankoraŭ marto; ni havas tempon por decidi pri detaloj.

K – Paŭlo, mi pensas, ke ni veturu per nia aŭto, kaj tiel ni povos alporti al ili donacojn, kaj ankaŭ pli libere moviĝi. Krome la vojaĝo daŭros nur unu tagon. Ni povos dumvoje rigardi kelkajn



urbojn, en kiuj ni ankoraŭ ne estis.

P – Mi ne volas stiri de frua mateno ĝis malfrua vespero. Mi preferas veturi per trajno, aŭ per aŭtobuso, ol sidi dum la tuta tago malantaŭ la stirilo!

K – Bone, ni veturu per aviadilo! Laŭ anoncoj, oni povas vojaĝi aviadile sufiĉe malmultekoste. Kial ni ne provu tion?

P – Tiel, ni mendu tuj la biletojn! … Ĉi tien ni tajpu la nomon de la urbo, kien ni veturos.

K – Belurbo.

P – Jes. Du plenkreskuloj… Dato. Ni rigardu la kalendaron! En la dua parto de junio, do, ekde la 23-a ĝis la 30-a.

K – Prefere jam ekde la 16-a, ĉu ne? Tiam ni havos pli da tempo tie.

P – Mi entajpas la 20-an, kiel tagon de ekveturo. Niaj nomoj… S-ro Paŭlo kaj s-ino Karla Belmonto. Niaj adresoj… kaj nun mi klakas por pagi la sumon. Ni pagos per kreditkarto. Jen, mi pretas!

# II. Agrabla prepariĝo

**Karla (K) kaj Paŭlo (P) babilas en sia hejmo, en monato junio, du semajnojn antaŭ la planita vojaĝo, kaj poste en la hejmo de la Najbaroj (N1 kaj N2).**

K – Mi preparis du listojn. En tiu ĉi mi skribis, pri kio ni devas zorgi antaŭ nia vojaĝo. Sur la alia listo troveblas ĉio, kion ni kunportos por la vojaĝo.

P – Ĉu vi jam notis ankaŭ la donacojn por la familio de Steĉjo?

K – Ankoraŭ ne. Mi deziras priparoli tion kun vi. Ni kalkulu: donacon por Steĉjo, por la edzino de Steĉjo, al ŝi eble iun belan brodaĵon, ĉu? Ludilojn por la infanoj, mi pensas.

P – Jes, morgaŭ ni aĉetos ĉion. Por Steĉjo eble… hm... mi ne scias, kion li malhavas, kio plaĉus al li. Eble iun specialan trinkaĵon.

K – Ni ankoraŭ vizitu niajn najbarojn, kaj petu ilin pri akvumado, kaj zorgi pri la papago.

P – Tiel ni devos doni al ili ŝlosilojn de nia pordego de la ĝardeno kaj ankaŭ de la domo. Morgaŭ mi faros kopiojn de tiuj ŝlosiloj.

## Post 2 tagoj

K – Paŭlo, rigardu, kion mi jam aĉetis por la edzino de via amiko.

P – Ho, tio estas vere tre bela donaco! Ĉemizo, antaŭtuko, ŝalo, kun belegaj brodaĵoj! Kaj tiu granda?

K – Ĝi estas brodita tablotuko, uzebla dum festoj, por la tuta familio.

P – Tre bone vi zorgis pri ĉio, karulino!

K – Nun ni iru al la najbaroj, kaj kunportu la ŝlosilojn, kara!



N1 kaj N2 – Saluton Karla kaj Paŭlo! Envenu!

K – Saluton!

P – Bonan vesperon Nora kaj Nikolao! Ni ne volas ĝeni vin; ni venis nur por mallonga tempo. Ni deziras peti vin pri afablaĵo. Tion por vi, ambaŭ.

N1 – Dankon por la vino! Sed ni ne trinku ĝin ĉe la sojlo; envenu kaj sidiĝu! Bonegan vinon vi alportis! Ankaŭ ni ŝatas ruĝan vinon! Kiel ni povas helpi al vi?

K – Post dek tagoj ni vojaĝos al Belurbo, al la maro! La eksa samklasano de Paŭlo loĝas tie, kaj nun li invitis nin por ripozi ĉe li.

P – Ni estos for nur dek tagojn.

K – Ni havas papagon. Ni ne povos kunporti ĝin al Belurbo. Ni petas vin afable zorgi pri nia birdo. Ĝi ne kaŭzas problemojn; necesas nur manĝigi ĝin, kaj purigi ĝian kaĝon.

N2 – Ĉu via papago povas paroli?



K – Jes! Ĝi konas sufiĉe multajn Esperantajn vortojn!

N1 – Kiel interesa hazardo! Ankaŭ ni nun lernas Esperanton; ni povos ekzerci nin kun via birdo, eĉ instrui al ĝi novajn vortojn!

N2 – Ni povos atenti ankaŭ pri via loĝejo, se vi deziras!

P – Ni multe dankas vin por tio! Estus tre bone, se vi povus ankaŭ akvumi nian ĝardenon, kiam necesas.

N1 – Volonte ni faros ankaŭ tion! Vi havas tre belajn plantojn kaj florojn! Ripozu senzorge!

P – Vi estas tre afablaj! Jen la ŝlosiloj! Kompreneble ankaŭ ni atentos pri via hejmo, kiam vi volos ripozi!

N1 – Ni antaŭdankas tion! Por la sekva jaro ankaŭ ni planas iun vojaĝon: tiam ni gastos ĉe esperantista paro, kaj nun ni diligente lernas Esperanton.

# III. Se fino bona, ĉio bona

**Karla (K) kaj Paŭlo (P) babilas en sia hejmo, en monato junio, kvar tagojn antaŭ la planita vojaĝo, kaj poste en la hejmo de la Najbaroj (N1 kaj N2)**

P – Saluton Karla! Mi volis telefonvoki vin, sed vi ne respondis.

K – Mi butikumis, kaj verŝajne pro tio mi ne aŭdis la telefonadon. Mi jam aĉetis ĉion por la vojaĝo! Por mi ankaŭ sunĉapelon, kaj por vi ĉapon. Postmorgaŭ ni enpakos ĉion, kaj post kvar tagoj ni jam ĝuos la sunon kaj la maron en Belurbo!

P – Bedaŭrinde ne. Ĉar…

K – Ne?

P – Ne. Tion mi volis diri, ke…

K – Kial ne? Sed jam ĉio aranĝita, jam ĉio estas...

P – Steĉjo retumis hodiaŭ, ke lia bopatrino rompis sian kruron, kaj la maljunulino

devas loĝi ĉe ili dum la sekvaj semajnoj. Li ne povos akcepti nin. Sed eble en aŭgusto…

K – Ho, Dio mia! Ĉu en aŭgusto? Mi dubas, ke tiam ni povos ankoraŭ trovi lokon por aviadilo!

P – Venu, kara, ni rigardu la eblojn en la reto! Belurbo… Aŭgusto… tiu jam ne… ankaŭ tiu ne… hm… Dum la tuta monato la aviadiloj estos plenŝtopitaj.

K – Mi terure bedaŭras la aferon! Jam mi daŭre pensis kaj revis pri nia granda vojaĝo! Paŭlo, ni devos informi niajn afablajn najbarojn, ke ni ne forestos.

. . . . . .

K kaj P – Saluton Nora kaj Nikolao. Ni nur deziras anonci, ke…

N1 kaj N2 – Saluton! Tamen, envenu! Pri kio temas?

P – Mia amiko, kiu invitis nin somerumi ĉe li, ĵus informis min, ke li tamen ne povas akcepti nin.

K – Kaj ni nun ne povas vojaĝi, kvankam ni jam eĉ la flugbiletojn aĉetis. Mi eĉ ne scias, kion fari.

N1 – Ho, kia bedaŭro!

N2 – Al kiu urbo validas viaj flugbiletoj?

P – Al Belurbo, proksime al Belurbo estas la flughaveno.

N1 – Niĉjo, en kiu urbo loĝas niaj novaj esperantistaj geamikoj?

N2 – Vi donis al mi bonegan ideon, Nora! Karaj, atendu momenton! Mi tuj konsultos miajn geamikojn per komputilo!

P – Imagu, Karla jam aĉetis eĉ konservitajn manĝaĵojn, kaj ankaŭ la donacojn por niaj gastigontoj.

N1 – Mi plene komprenas vian situacion! Sed jen, mia edzo jam revenas kun bona humoro.

N2 – Dank' al tekniko kaj skajpo, mi povis paroli kun mia esperantista amiko! Mi rememoris, kion li rakontis al mi antaŭ kelkaj tagoj. En sia familia domo li aranĝis la ĉambron de sia filo por gastoj, ĉar lia filo edziĝis kaj transloĝiĝis al alia urbo. Do, li volonte akceptos, kaj eĉ veturigos vin de la flughaveno al sia hejmo.

K – Ho, kiel ni danku tion! Mi eĉ ne trovas vortojn!

P – Ni estas tre dankemaj al vi, karaj!

N2 – Nedankinde! Tio estas vere nur hazardo, ke mia nova amiko ĝuste nun decidis akcepti esperantistajn gastojn! Li estas ne malnova esperantisto, li eklernis la lingvon antaŭ nelonge, same kiel ni.

K – Kaj tiu hazardo redonas al vi la eblon viziti Belurbon, la maron, la montojn!

N2 – Li menciis tamen, ke li ne loĝas en Belurbo, sed en apuda vilaĝo, tamen tute proksime al la maro. Do, vi mem vidos kaj ĝuos ĉion baldaŭ!

# TASKOJ

**I.** Legu atente la tri partojn (ĉapitrojn), unu post la alia, trovu la nekonatajn vortojn kaj esprimojn! Post plia relego, respondu la demandojn:

**A)** Kiu skribis leteron al Paŭlo? De kie ili konas unu la alian? Kiun rememoron havis Karla kaj Paŭlo pri tiu persono? Kio estis en la letero? Kion decidis Karla kaj Paŭlo? Kial ili ĝojis? Kial ili volis veturi per aviadilo? Por kiu tago ili mendis la flugbileton? Kiel ili pagis la prezon de la flugbileto?

**B)** Pri kio devis zorgi Karla kaj Paŭlo antaŭ la vojaĝo? Kiuj donacoj estis aĉetitaj kaj por kiuj? Kial ili volis viziti la najbarojn? Kion petis Karla kaj Paŭlo de la najbaroj? Kion ili alportis al la najbaroj? Kial ĝojis la najbaroj? Kun kiu ili komunikadas en Esperanto?

**C)** Kial volis voki telefone Paŭlo Karlan? Kial ne respondis Karla la telefonvokon? Kial ili devas ŝanĝi sian planon kaj kiamaniere? Kion ili kontrolis rete kaj kio estis la rezulto? Kion ili diris al la

najbaroj? Kion respondis la najbaroj? Kun kiu volis rete kontakti la najbaro kaj kial? Kiun solvon ili trovis por la somero?

**II.** Rakontu propravorte la historion, sed sen dialogoj kaj sen citiloj!

Rakontu, kiel aspektas la fantazia Belurbo kaj la marbordo, laŭ vi!

Rakontu, kion skribis Steĉjo al Karla en sia unua kaj lasta letero!

Rakontu, kion demandis kaj proponis la najbaro al sia esperantista amiko, kiam ili skajpe babilis!

**III.**

**A)** Verku leteron, nome de Steĉjo al Paŭlo kaj Karla, en kiu vi invitas ilin al via hejmo, kaj verku ankaŭ mallongan sciigon, ke vi – Steĉjo – tamen ne povas akcepti ilin.

**B)** Verku leteron, en kiu vi invitas vian amik(in)on por somerumi ĉe vi, dum ok tagoj. Detale rakontu, kiel aspektas via (imagita) domo aŭ loĝejo, kia estas la ĉirkaŭaĵo, kia estas la klimato ĉe vi, kiujn programojn vi proponas, kiajn vestaĵojn li aŭ ŝi kunportu!

**C)** Verku leteron, en kiu vi rakontas, kien vi planis veturi dum la somero, kiamaniere, por kiom longe, kion vi planis fari tie, kaj vi tamen ne povis vojaĝi, ĉar vi kaptis viruson. Kion vi devis tiam aranĝi (malmendi hotelon, vojaĝbiletojn ktp).

## VORTKLARIGOJ

***Rosti:*** en varmego, sen akvo kuiri manĝaĵon; ***vilao:*** eleganta somerdomo; ***murmuro:*** mallaŭta sono; ***stirilo:*** parto, per kiu oni direktas la veturilojn; ***brodaĵo:*** ornamaĵo sur teksaĵo, farita per fadeno aŭ tiel ornamita teksaĵo; ***papago:*** ekzotika birdo, ofte kapabla aŭdigi homajn vortojn; ***kaĝo:*** speciala kesto por teni, porti hejmajn bestetojn; ***plenŝtopita:*** sen libera spaco aŭ loko; ***situacio:*** tuto de kondiĉoj; ***humoro:*** anima stato; ***skajpo:*** interreta eblo por komunikado.

# Humuro: Mia vivo ĉe Fejsbuko

Vi kutimas foti momentojn el via vivo kaj aperigi informojn ĉe Fejsbuko. Skandala iĝis la fakto, ke ne nur komercistoj, sed ankaŭ politikistoj povas uzi la donitaĵojn pri vi, viaj ŝatoj, viaj okupoj, kiujn vi "volonte", senpage kaj regule disponigas al la tuta mondo. Jen humura teksto, kiu aperis en rusa gazeto "Argumentoj kaj faktoj" nº 16/2018. Pripensu....

Ĉar mi ne havas Fejsbukon, mi provas trovi amikojn ekster tiu platformo, uzante la samajn principojn.

Ĉiutage mi eliras surstraten kaj klarigas al preterpasanto, kion mi manĝis, kiel mi fartas, kion mi faris hieraŭ vespere, kion mi estas faranta, kion mi faros morgaŭ; mi enmanigas foton de miaj geamikoj, de mia kunulo, mi donas foton de mi, riparanta mian biciklon, aŭ kiam mi estis du-jara. Mi same kun granda atento subaŭskultas interparolojn kaj komentas "Mi ŝatas".

Hura! Hodiaŭ mi sukcesis. Sekvas min kvin homoj: 2 policistoj, psikiatro, psikologo kaj flegisto.

**Renée Triolle**






# El mia kolora vivo

Verkinto kaj desegninto: Pavel Rak

Kolorigu la suban bildon laŭ la supra! Priskribu la naturon, nomu la objektojn, arbojn, homojn kaj iliajn vestaĵojn! Kion ili faras? Kiuj koloroj videblas sur la bildo? Kio tie okazas?






Kolorigu! Trovu la diferencojn!



José de Jesús Campos Pacheco:

# Kameloj

**Kameloj (latine *camelus*, greke *kamelos*) estas speco de remaĉantaj mamuloj el la ordo de parhufuloj, vivantaj en stepoj, kun unu aŭ du ĝiboj sur la dorso.**



Ilia hejmo estas sur la sekaj, senarbaj dezertoj kaj en rokplenaj lokoj. La dezerta kamelo de la Centra Azio nomiĝas Baktria Kamelo kaj havas du ĝibojn. Ĝia haŭto estas dika kaj tial ĝi povas toleri malvarman veteron kaj lacigan grimpadon sur la montaj vojetoj kaj la malmodernaj karavanvojoj. La plimulto estas jam dresita, sed kelkaj ankoraŭ loĝas sovaĝaj sur la Gobia Dezerto.

La kamelo de la dezerto havas unu ĝibon kaj nomiĝas dromedaro. Ĝi estas la konata “ŝipo de la dezerto” kaj ebligas al araboj kaj nordafrikanoj vojaĝi longajn distancojn trans la dezerto. Unu speco, la ŝarĝkamelo, estas diversmaniere utila por porti ŝarĝojn, tiri plugilon, funkciigi akvoradojn kaj provizi lakton, harojn, felon kaj viandon.



Dromedaro utilas por rapida veturado. Ĝi povas marŝi 160 kilometrojn en unu tago po 16 kilometroj en horo kaj elteni sen akvo dum kvin tagoj. Nutraĵon ĝi povas konservi kiel grason en la ĝibo, kaj akvo estas konservata en specialaj ĉeloj, kiuj ĉirkaŭas la stomakon.

Lamoj estas remaĉantaj parhufuloj, sud-amerikaj hejmbestigitaj kameledoj. Ili ne plu estas sovaĝaj bestoj, sed vivas kiel brutoj. Ili provizas al la homoj nutraĵon, lakton, felon kaj lanon.



Aranka Laslo:

# Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj

**Ĉu vi aŭdis jam pri la fama verkisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj? Li estis multflanka persono kun tiom da interesoj, ke malfacilas listigi ĉion.**

Li estas konata ankaŭ kiel esploristo, alpinisto, etnologo, muzeologo, tradukisto, ĵurnalisto, poligloto kaj esperantisto...

Proksimume tiel komenciĝis la konkurso-teksto por lernantoj de bazaj kaj mezaj lernejoj en Subotica (Serbio), por alvoki ilin legi iun verkon de Tibor Sekelj (vojaĝpriskribon, romanon, novelon aŭ poemon), kaj inspirite de la elektita legaĵo verki unu aŭ plurajn konkursaĵojn: literaturan, pentroartan aŭ fotografion.



Premiitoj kaj iliaj mentoroj

Tiu ĉi komuna konkurso de la Politeknika Lernejo (faka mezlernejo) kaj Esperanto-societo “Tibor Sekelj” en Subotica estis lanĉita fine de la pasinta jaro, okaze de la 30-a datreveno de la forpaso de Tibor Sekelj.

La konkurson partoprenis 11 lernejoj. Entute alvenis 117 verkoj de 98 lernantoj, kaj 38 el ili estis premiitaj per 1-a, 2-a aŭ 3-a premioj, aŭ speciala mencio (en iuj kategorioj la ĵurio aljuĝis dividitajn, t.e. plurajn premiojn). La 28-an de marto 2019 okazis solena premiado kun ekspozicio de ĉiuj verkoj en la lernejo. Krom la trilingva diplomo ĉiu gajninto ricevis donacojn ne nur de la lernejo kaj de la Esperanto-societo, sed ankaŭ unu libron de Tibor Sekelj aŭ libron pri li, plejparte danke al la grandanima donaco de Erĵebet



Solena premiado en la lernejo: la direktoro transdonas la premion




Richárd Perna, 4-a klaso, 1-a premio




Lena Babičkov, 2-a klaso, 1-a premio


Mia Franciŝković, 3-a klaso (argilmasko), 1-a premio


Emese Tóth, 4-a klaso de la gimnazio, 1-a premio

Sekelj (Erzsébet Székely), lia vidvino. La Esperanto-societo disdonadis lernolibron de Esperanto kun vortaro de Antonije Sekelj, frato de Tibor.


Tibor Sekelj estas tre konata en la Esperanta mondo. Li verkis ankaŭ esperantlingve, kaj multajn liajn vojaĝojn faciligis lia kono de la internacia lingvo.

Mi proponas al la legantoj de *Juna Amiko* legi almenaŭ unu el la multnombraj verkoj de Tibor Sekelj, ekz. *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo, Padma, la eta dancistino, Mondo de travivaĵoj, Tempesto super Akonkagvo,* k.a.


Ana Vajhand, 8-a klaso, 1-a premio


Szintia Sebők Csáki, 4-a klaso, 1-a premio


Máté Erdélyi Pataki, 1-a klaso, 1-a premio






















# Amikon montras malfeliĉo

## La rubrikon prizorgas Mónika Molnár

**Iun vesperon la tuta familio sidis ĉe la tablo, manĝis bonan vespermanĝon, kiun Avinjo faris, kaj ĉiuj entuziasme rakontis siajn tiutagajn travivaĵojn.**

Ĉiuj, aŭ preskaŭ ĉiuj, ĉar inter tiu bruanta ulidaro estis unu, kiu restis silenta. Ulideto perdiĝis en siaj pensoj kaj maŝine, senvorte manĝis sian supon. Zorgemulido sidiĝis apud lin kaj delikate demandis la etulon:

– Hej, Ulideto, kio okazas al vi? Ĉu la supo ne estas bongusta?

– Ho, la supo? Ne, ne... aŭ pli bone diri jes, jes, ĝi estas tre bongusta...

– ...sed? Kio estas la problemo? Ĉu lerneja? Ĉu mi povas helpi vin?

– Mi ne scias. Okazis io en la lernejo kaj mi ne vere scias kion fari. Eble vi povus konsili min. Ekde kelkaj semajnoj ni havas novan lernanton en nia klaso. Li nomiĝas... ni diru Novulido. Sed mi povus nomi lin ankaŭ Tristulido, ĉar li ĉiam estas sola kaj mi ankoraŭ neniam vidis lin rideti.

– Pardonu min, Ulideto, ĉu mi bone komprenis, ke eĉ lian nomon vi ne konas?

– Ekzakte! Li neniam parolas kaj se tamen jes, li parolas tiom mallaŭte, ke oni komprenas nenion. Ankaŭ lian nomon mi ne aŭdis. Kion fari?

– Mi havas ideon! Iru rapide lavi la dentojn kaj mi atendos vin per rakonteto de Oréade Thirion, kiu eble donos al vi bonan konsilon antaŭ la enlitiĝo.




**Oréade Thirion: Unu hundo kaj unu kato – la plej bonaj amikoj**



Estis foje unu hundo kaj unu katino. La hundo estis ĉiam tute sola kaj la katino estis tre populara. Sed iun tagon...



La katino vidis la hundon tute sola kaj diris: – Saluton, ĉu vi bezonas helpon? – Jes, mi ne havas amikojn – diris la hundo – kaj mi estas tute sola.




– Do, ekde nun mi estas via amikino. Mi volas formi muzik-grupon. Ĉu vi volas ludi en nia grupo?
– Jes, jes, mi volas! Kiom ĝentila vi estas! Dankon!




– Bone, bone – diris la katino. – Venu kun mi. Jen, ĉi tie estas la muzik-salono, kie ni provludos.
– Ho, ĝi estas tre granda! – diris la hundo.



– Kiun instrumenton vi volas ludi? – demandis la katino.
– Mi ŝatus ludi gitaron. Mi scias bone ludi ĝin. – respondis la hundo.




– En ordo. Mi mem ludas pianon – diris la katino.
– Kaj jen mia amikino, la kuniklino. Ŝi kantas tre bele.
– Dankon, katino! Mi tre-tre ĝojas! – diris la hundo.



La pian-ludo de la katino kaj la gitar-ludo de la hundo akompanis la belan voĉon de la kuniklino. Ilia koncerto havis sukceson kaj multaj aliaj sekvis ĝin.

– Do, Ulideto, estas tempo por endormiĝi, sed antaŭe diru al mi, ĉu vi jam havas ideon kiel helpi vian amikon?

– Mian amikon? Li ne estas mia amiko. Mi eĉ ne konas lin.

– Kredu min, ke li tamen fariĝos via amiko. La unua ligilo jam ekzistas inter vi. Li estis trista kaj lia malfeliĉo tuŝis vin. Jen signo de amikeco. Nun iru dormi kaj morgaŭ ni vidos. Bonan nokton!

Ulideto estis tiom ekscitita, ke li apenaŭ sukcesis endormiĝi. La sekvan tagon preskaŭ kurante iris li en la lernejon kaj per la sama elano kuregis li hejmen post la lecionoj por rakonti la okazintaĵojn al Zorgemulido: – Imagu, Modestulido havas la saman ŝatokupon kiel mi! Ankaŭ li ŝatas teatrumi, inventi kaj ludi diversajn scenojn, kiel mi. En via historio la muziko estis la kunligilo, ĉe ni la teatrumado. Mi tiom ĝojas! Kaj ankaŭ Modestulido finfine ĝojas! – Bone, bone – diris Zorgemulido, – sed kiu estas Modestulido? – Kiu, kiu? Kompreneble Modestulido estas la nova knabo, mia nova amiko!

Renée Triolle

# Ŝparu viajn orelojn!


**Ĉu vi jam rigardis televidon, elŝaltinte la sonon? Ĉu vi ion komprenis? Parolis homoj, sed vi ne povis sekvi la diskuton. Tio estas la sorto de kompatindaj surduloj aŭ misaŭdantoj. Se vi bonŝance naskiĝis kun bona aŭdkapablo, ŝparu ĝin.**

## Kio estas oreloj?

Oreloj estas organoj por aŭdi kaj ili ne estas anstataŭigeblaj. Orelo konsistas el tri partoj: la ekstera (videbla, grandega ĉe bestoj, kiuj bezonas bone aŭdi por rapide fuĝi, kiel kunikloj aŭ antilopoj) sonkaptilo nomiĝas aŭriklo kaj tubo kondukas la sonojn enen.

La meza orelo konsistas el timpana membrano (miringo) kaj tri ostetoj, la plej malgrandaj de la homa skeleto: maleo, inkudo, stapedo. La tuto vibras kiel drumo por produkti sonojn. Estas ankaŭ eŭstakia tubo, kiu evitigas, ke timpana membrano rompiĝu okaze de subakva plonĝo aŭ tro granda alteco. Tio estas postsekvo de la fiŝoreloj, kiam homo estis fiŝo.






**Anatomio de orelo: 1 - kranio, 2 - aŭda kanalo, 3 - aŭriklo, 4 - miringo, 5 - ovala fenestro, 6 - maleo, 7 - inkudo, 8 - stapedo, 9 - osta labirinto, 10 - koĥleo, 11 - aŭdonervo, 12 - naza kanalo (laŭ Vikipedio).**

Tio komunikas kun la nazaj tuboj kaj ekvilibrigas la premon.

La interna orelo konsistas el nervaj ĉeloj, kiuj respondas diversajn frekvencojn kaj permesas aŭdi. La "aŭdharoj" transformas la moviĝon de la haroj en nervan signalon kaj kondukas al la aŭda nervo .

Vi komprenas, kiom kompleksa estas la tuta sistemo, bele konstruita por bone funkcii, krom se stulta sinteno detruas tiun ekvilibron.

## Protekti kaj savi sian aŭdkapablon

Niaj prauloj bone aŭdis, ĉar frua aŭdo de bruo povis savi ilian vivon, kiel ĉe sovaĝaj bestoj. Pliboniĝis la teknologio, ekzistas diversaj aparatoj, kaj sekve vi aŭskultas muzikon pli laŭte ol normale. Antaŭe nur maljuniĝo difektis la aŭdkapablon kaj maljunuloj (75-80-jaruloj) vizitis fakulon por aĉeti aparaton. Nun fakuloj konstatas, ke venas pli kaj pli junaj klientoj (60-jaraj), sed multaj junuloj perdas la aŭdkapablon, ne akcidente, sed pro stulteco!

Vizito de diskoteko, kie tro laŭte bruegas muziko kaj stulta ludo, kiu puŝas vizitantojn resti kiel eble plej longe ĉe laŭtparolilo, tremigas la korpon, sed detruas ĝis 60% de




la aŭdkapablo. Tiu defio, neimageble stulta, neripareble detruas tiun naturan juvelon!

Same konstanta bruo, eĉ se vi konsideras ĝin muziko, lacigas la orelojn, kiuj devas ripozi, do ne metu konstante aŭskultilojn en la orelojn, distanciĝu de tiu Y-generacio! Y reprezentas la du aŭskultilojn en la oreloj kaj la draton, kiu kondukas al la elsendilo.

Dum leĝo provas protekti la homojn, kiuj bedaŭrinde pro laboro devas fronti bruegon (riparistoj de stratoj, laborantoj en flug-havenoj, ekzemple), devigante ilin surhavi kaskon, kiu malgrandigas la bruon, neniu leĝo povas protekti stultulojn, kiuj mem riskas ne sian vivon sed sian socian vivon.

Aŭdi 85 decibelojn dum 8 horoj/tage kreas traŭmatojn (komparu, en diskoteko, 105-102 decibeloj).

## Simbolo de orelo

En la francaj lernejoj de la 19-a jarcento malbona kaj maldiligenta lernanto ricevis “azenĉapon” kun longaj oreloj de azeno, konsiderata kiel stulta besto. Male en Hispanio, toreisto, kiu bone toreis kontraŭ taŭro, ricevas orelon de la virbovo. En arto, vi eble konas tiun pentraĵon de Van Gogh, kiu tranĉis al si orelon dum momento de frenezo. Alia artisto, Stelarc, greftis al si orelon sur la maldekstran brakon! En multaj civilizacioj oni provis modifi la formon de la eksteraj oreloj, longigante ilin, aldonante truojn aŭ juvelojn, aŭ tatuaĵon. Kaj vi certe vidis brutaron kun metala identigilo en la orelo.

## Konklude

Se vi ne povos eviti malsanon, vi povas ŝpari viajn orelojn kaj savi vian aŭdkapablon. Ne aŭskultu tro laŭtan muzikon, ripozigu viajn orelojn. Fermu la okulojn kaj aŭskultu la susuron de folioj, la kanton de birdoj, la zumadon de insektoj. Naturaj “bruoj” estas tre diversaj kaj interesaj kaj en via maljuna aĝo vi ĝuos la plezuron diskuti kun homoj kaj aŭdi tion, kion ili diras!





Azenoreloj kreskis al Pinokjo kaj poste li fariĝis vera azeneto kaj komencis i-a-i.





José de Jesús Campos Pacheco:

# Kolora mondo



**En vilaĝo ĉe riverbordo vivis la plej magia loĝantaro de la kolora mondo. Ĉiuj loĝantoj, elkreskante, havis jenan kapablon: ilia haŭto alprenis la koloron, kiun ili deziris. En la vilaĝo vivis ankaŭ la plej nekredeblaj bestoj de la kolora mondo.**

La unukornulo Peĉjo, per sia magia korno, transformis la akvon de la rivero en bongustajn sukojn, kaj kiam ĝi tuŝis la akvon dufoje, tiu revenis al sia natura stato. Sed ĉiam dolĉa kiel sukero.

La draketo Tenĉjo emis flugi ĝis la nuboj, kaj kiam ĝi petis la nubojn pluvi, ili faris ke la floroj havu sian favoratan deziron. Kaj la floroj de tiu vilaĝo povis paroli, kanti kaj perceptis la gajecon de la loĝantoj.

Sed iun tagon okazis io stranga. La floroj ne plu kantis, la nuboj jam ne estis en la ĉielo, la rivero gustis amare, sed la plej malbona afero estis ke la koboldoj jam ne havis koloron sur sia haŭto. Nur Peĉjo kaj Tenĉjo ne ŝanĝiĝis. Ĉar kiam tiuj naskiĝis en la kolora mondo, oni banis ilin en la magia akvofalo, kaj pro tio ili neniam perdis sian kapablon. Ili estis protektataj de la saĝa magiisto Ĥajmo, kiu per sia magio kutimis transformiĝi al infano, ĉar li pensis ke infanoj amas la tutan fantazian landon tiel, kiel neniu alia loĝanto en la mondo.

Ĥajmo, kiam naskiĝas besto, donacas al ĝi fajfilon, kaj kiam Ĥajmo fajfas, el la fajfilo aperas koloraj bobeloj.

Ĥajmo, per sia magia komputilo, vidis, ke okazas io stranga. Li pensis: "Nun estas la momento, ke la magiaj bestoj pruvu sian inteligentecon, kiu estis al ili donita la unuan fojon, kiam ili banis sin en la akvofalo." Ĥajmo transformiĝis al infano, kaj, sidante en arbo, li fajfis sep fojojn per sia fajfilo. Kaj subite aperis ĉiuj bestoj de la kolora mondo. "Amikoj de la kolora mondo! Mi vokis vin, ĉar mi bezonas volontulojn por esplori, kio okazis al la kapablo de la koboldoj, kaj kial la floroj ne kantas kaj ne estas nuboj en la ĉielo."

La bestoj respondis samtempe: "Peĉjo kaj Tenĉjo estas la plej saĝaj bestoj de tiu ĉi regno. Ni elektis ilin, ĉar ili estas niaj gvidantoj jam de pluraj jaroj. Kaj ni deziras ke ili sukcesu en tiu misio, kaj ke ili savu la teron."

"Ni konsentas, sed kun ni vojaĝu sep koboldoj, ĉar ili estos tiel utilaj dum tiu misio, kaj ni estas certaj, ke ili retrovos siajn kapablojn."

"Bone", diris Ĥajmo, "estu tiel. Sed mi devas averti, ke la vojo estas longa, kaj la respondo al tiu problemo troviĝas ĉie."

La draketo, la unukornulo kaj la sep koboldoj ekvojaĝis, sen imagi la kaŭzon de la problemo. Proksime troviĝis la vilaĝo de la feino. Sur ŝtonego sidis malgranda feino, kiu ne povis flugi kaj ankaŭ perdis sian magian vergeton.

La koboldoj diris al la bestoj: "Gefratoj, ni helpos la feinon."

"Feino, ni instruos al vi flugi. Sed unue vi devas venki la timon. Ni estos apud vi ĝis via timo estos venkita, kaj vi ne bezonos vian vergeton, ĉar la veran magion oni portas en la koro." Sep tagojn post tiom da penado, la feino komencis

flugi kaj jam ne sentis timon. Subite okazis io nekredebla. La feino retrovis sian vergeton ĉe la fenestro de sia domo, kaj unu el la koboldoj akiris sian kapablon kaj lia haŭto verdiĝis. En la vilaĝo de la kolora mondo ĉiuj verdaj koboldoj reakiris sian kapablon kaj sentis sin feliĉaj.

La venontan tagon ili adiaŭis la feinon kaj daŭrigis sian vojaĝon. Ankoraŭ estis ses koboldoj sen koloro, kiam ili subite alvenis al lageto, antaŭ kiu kuŝis fiŝo preskaŭ mortanta ĉe la bordo.

"Amikoj!" diris ĝi per apenaŭ aŭdebla voĉo. "Mi devas atingi la akvon. Alie mi mortos. Mi petegas. Mi bezonas akvon por vivi."

Unu el la koboldoj aŭdis la peton de la fiŝo, kaj zorgeme li metis ĝin en la akvon. La fiŝo dankis lin pro lia afableco kaj adiaŭis.

Okazis denove io neordinara. Aperis nuboj en la ĉielo, kaj tiu koboldo reakiris sian bluan koloron. Tio surprizis la unukornulon kaj la draketon. Ankoraŭ estis kvin koboldoj sen koloro, kaj ĉiuj daŭrigis sian vojaĝon.

Jam ili estis tre lacaj kaj ekkuŝis sub arbo, kiam subite ili aŭdis la ploradon de oranĝaj kaj de violkoloraj floretoj. Du ĝemelaj koboldoj proksimiĝis al la floretoj kaj demandis kio okazis. Kaj tiuj respondis:

"Petolema giganto venas ĉiumatene kaj tranĉas florojn. Ni sopiras niajn fratinetojn, kaj ni ne konas ilian sorton."

"Ni atendos la giganton morgaŭ frumatene kaj ni parolos kun li," respondis la bestoj kaj la koboldoj. La sekvan matenon ĉiuj atendis la giganton.

"Giganto! Ĉu vi ne hontas pri la floretoj?"

"Vere, mi ege hontas. Sed frumatene mi tranĉas florojn kaj donas ilin al mia patrino, ĉar ŝi malsanas. Ŝi havas gripon jam de monato."

"Ni havas la solvon", diris la ĝemelaj koboldoj. "Ni serĉos vian patrinon, kaj ni faros piknikon ĉi tie, meze de la odoro de la floroj. Kaj mi certigas al vi ke ŝi saniĝos."

La ĝemelaj koboldoj, kun la unukornulo kaj la draketo, tuj iris al la kaverno de la gigant-patrino. Eniris la kavernon la unukornulo kaj la draketo. En la kaverno ili salutis la patrinon kaj konsilis al ŝi ekrajdi sur la unukornulo. Tiel ili ĉiuj reiris, kun la gigant-patrino sur la unukornulo. Kiam ili atingis la florkampon, la gigant-patrino salutis la aliajn koboldojn kaj la florojn kaj donacis la plej bongustajn fruktojn al la koboldoj kaj akvumis la floretojn. Poste ili ludis kaj manĝis dolĉaĵojn.

Subite okazis denove io neordinara. Unu el la ĝemeloj reakiris sian oranĝan koloron kaj sian magian kapablon, kaj la alia sian violkoloron, kaj la floroj de la kolora mondo ekkantis sian melodion, kaj ĉiuj oranĝ- kaj viol-koloraj koboldoj de la kolora mondo ankaŭ reakiris sian koloron.

Jam Peĉjo kaj Tenĉjo estis malkovrantaj tion kio vere okazas en la kolora mondo. Subite, en la ĉielo, aperis grandega kaleŝo. El tiu eliris steleto, kiu diris al ili: "La Luno deziras ke vi vizitu ĝin. Ĝi bezonas vian helpon. En la ĉiela regno oni parolas kiel vi konvinkis la giganton ne tranĉi la florojn, kiel vi savis la fiŝon kaj kiel la feino lernis flugi danke al vi. Eniru la grandan kaleŝon, koboldoj, kaj vi du, unukornulo kaj draketo, flugu al la ĉiela regno!"

Kiam ili atingis la ĉielan regnon, la Luno bonvenigis niajn amikojn, kaj ĝi klarigis al ili: "Amikoj! Mi suferas pro amo. Mi amas la Sunon intense. Sed ni neniam povas interparoli. Estas malĝoje ami, sen scii ĉu mi estas amata."

Ĉiuj pensis kaj pensadis. Kaj unu el ili respondis: "Mi havas la solvon. Dum la venonta eklipso, vi, s-ino Luno, povas ami la reĝon Suno."

La Luno ridetis kaj dankis la koboldeton. Subite la koboldeto reakiris sian flavan koloron, kaj tiel ĉiuj flavaj koboldetoj de la kolora mondo reakiris sian flavan koloron.

Tri tagojn poste, la Suno kaj la Luno geedziĝis, kaj niaj amikoj ĉeestis la ceremonion.



“Unukornulo, mankas nur du koboldoj sen koloro”, diris la draketo. “Jam mi havas la solvon de la problemo.” En tiu momento Ĥajmo vidis sur la ekrano de sia komputilo niajn amikojn, kiam, proksime de la loko, kie troviĝis niaj amikoj, estis Georgo Arturo, lia frato, sorĉisto de la najbara regno, kiu multe amuziĝis ĉasante bestojn. Ĥajmo, per la povo de sia magio, atingis tiun lokon, kaj ekstaris antaŭ la draketo. En tiu momento la sago estis lanĉita.

“Aaaaj”, kriegis la magiisto Ĥajmo. Ĉiuj alkuris al la magiisto, kaj la draketo, kun siaj okulegoj kovritaj de larmoj, dankis la magiiston pro tio, ke li malhelpis lian morton aŭ vundiĝon. Georgo kuris al sia frato Ĥajmo kaj diris:

“Ho frato mia! Senkulpigu min. Mi estos apud vi, ĝis via vundo saniĝos. Ĉiuj bezonas vian magion.” Ĥajmo respondis:

“Mi saniĝos. Ĉu vi promesas, frato mia, ke vi ne mortigos, nek vundos bestojn en la regno?”

Dum kelkaj tagoj Georgo kaj grandkapa koboldo kuracis la vundon de Ĥajmo per kuracaj plantoj. Ĉiuj estis tre feliĉaj pro lia resaniĝo.

Subite la grandkapa koboldo, kiu pacience kuracis kun Georgo la magiiston, reakiris la ruĝan sangokoloron sur sia haŭto. Jam tute resaniĝinta, Ĥajmo demandis la draketon:

“Amiko, vere vi solvis la enigmon.”

“Jes”, respondis la draketo, “en la ĉiela regno mia amiko, la unukornulo, kaj mi konsciiĝis, ke kiam iu el ni faris ion bonan, la koboldo reakiris sian koloron, sed ankoraŭ estas multaj taskoj farendaj.

Ni decidis, ke kiam la kolora mondo revenos al sia normaleco, ni vojaĝos al la mondo de la homoj, kaj ni instruos al la infanoj, kion ili povas fari por esti homoj de bona sento, kiuj amas siajn samspeculojn. Ili protektos la naturon kaj la vivon sur sia planedo. Povas esti, ke en la estonteco, en ilia planedo, ne ekzistos milito kaj ĝi estos savita kiel la kolora mondo.”





Ĥajmo respondis: “Tio povas sukcesi, se ni laboros persiste. Pro tio, tiu koboldo estas blanka kaj verda, kiel la Esperanta flago, kaj li reprezentos la purecon kaj progreson, kaj mi donacos tiun verdan stelon kiel signon de la Esperanta lingvo. En la homa mondo vi trovos esperantistojn, kiuj helpos vin.”

Niaj amikoj savis la koloran mondon, kaj nun ili vojaĝos al la homoj en la homa mondo, kie nova misio atendas ilin. Sed kun la helpo de la infanoj de tiu planedo, ili sukcesos en sia nova aventuro.

# Pardonpeto

**En *Juna Amiko* 1/2019 aperis artikolo *Pri dentoj*. Ĝia aŭtoro estas Raita Pyhälä (Saliko), ne ~~Renée Triolle~~. La redaktoro pardonpetas pro la eraro.**

Renée Triolle

## Pri dentoj



**Ĉu vi kalkulis, kiom da dentoj vi havas? Kaj via amiko, ĉu li havas same multajn? Kiel vi zorgas pri viaj valoraj dentoj? Vi bezonos ilin dum via tuta vivo! Meti implantaĵon kostas multege, kaj sen dentoj oni ne povas manĝi.**

La dentoj de bebo komencas aperi en la aĝo de 4-11 monatoj. Patrinoj diras, ke tio estas malfacila tempo, la infano ploras kaj kondutas malfacile. La unuaj dentoj kaŭzas grandan intereson en la familio kaj parencaro. Oni demandas: Ĉu la bebo jam havas dentojn? Kiom da dentoj ĝi havas? En pluraj lingvoj oni nomas la unuajn dentojn laktodentoj. Entute ili estos 20 kaj aperos ĝis la aĝo de 3 jaroj.




Ĉu vi jam perdis iun denton? Ĉu jam novaj dentoj kreskas en via buŝo? En mia lingvo oni nomas ilin ferodentoj. Kiel vi nomas ilin en via lingvo? Ili nombros 32, kaj la lastaj “saĝodentoj” aperas, kiam ni havas ĉ. 19 - 20 jarojn. Ne ĉiu homo havos ilin. Ili ne estas nepre necesaj, kaj kelkaj dentistoj rekomendas, ke oni eligu ilin antaŭ la aĝo de 30 jaroj, ĉar ili povus kaŭzi problemojn. Kiam laktodento eliĝas, la infano ofte deziras montri ĝin. Kelkaj patrinoj kaŝas la dentojn en ujeto. En kelkaj landoj oni enterigas la dentojn kaj pensas, ke oni ĉiam loĝu tie, kie troviĝas la dentoj. En mia infanaĝo oni ĵetis la denton al muso kaj petis ĝin doni feran denton anstataŭe. Ĉu vi aŭdis pri iu tia rimaĵo en via gepatra lingvo?



Luiza Carol

# Kie troviĝas la mistera insulo?

**Pri "Perdiĝi en Finsulo" de avo Moti Sarid. Elhebreigis Amri Wandel. Ilustris Yael Kimĥi Orel. Eldonita de ELI (24 paĝoj).**




Tiu ĉi libro estas versa rakonto, pri mistera insulo, kiu nomiĝas "Finsulo". Tien iras ĉiuj aĵoj, kiujn ni perdas. Por trovi ilin, ni devus serĉi ilin ĝuste tie. Sed kie troviĝas Finsulo?

La belaj ilustraĵoj de la libro montras ĉiuspecajn perditajn aĵojn, kiuj mistermaniere atingis la bordon de la malproksima Finsulo. Ne nur aĵojn vi povos vidi tie, sed ankaŭ katon, papagon, aliajn bestojn, eĉ avinon… Jen la versa priskribo pri Finsulo:

*"Tute for, kiel eta makulo,*
*Ĝin atingi eĉ ŝipo ne povas,*
*Sed en tiu ĉi kaŝita insulo*
*Oni preskaŭ ĉion retrovas:*
*Moneroj, ora skribilo,*
*Butonoj, notoj de kanto,*
*Ŝlosiloj, katido,*
*Eĉ dent' de elefanto!*
*Eĉ dent' de elefanto!"*

La rakonto finiĝas per la trankviliga onidiro, ke iam ĉiuj homoj, aĵoj kaj bestoj trovos unuj la aliajn kun ĝojo en Finsulo. Ĉu vere? Kion vi opinias pri tio? Ĉu vi rememoras pri perditaj aĵoj, kiuj estis karaj al vi kaj vi dezirus retrovi ilin? Ĉu perditan dombeston vi ŝatus retrovi? Eble vi volus denove renkonti iun karan personon, kies adreson vi ne plu havas? Ĉu?

Kiam mi legis tiun ĉi belan poem-rakonton, mi rememoris pri pupoj kaj pluŝbestoj, kiujn mi perdis, pri mia kara instruistino en la unua klaso de bazlernejo, kies adreson delonge mi perdis… Fakte mia tuta infaneco delonge forflugis al Finsulo…

Ĉu vi scias, mi iel sentas, ke Finsulo troviĝas ene de nia koro. Se ni ankoraŭ amas ion aŭ iun, tio signifas, ke tiu aĵo aŭ tiu persono ne vere perdiĝis. Kion vi opinias?



# Legu kaj ĝuu



Rubrikestro: Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3,
PL-59-300 Lubin,
Pollando, rete:
*malgosia.
junaamiko@gmail.com*



## Profitoj el la legado

**Karaj legantoj de *Juna Amiko*, mi jam pli ol dek jarojn instigas vin legi librojn.**

Mi ricevas de vi kuraĝigajn vortojn kaj de tempo al tempo viajn pripensojn. Bonvolu tralegi vortojn de Jolanta Bojarska el Vroclavo:

“Unu el avantaĝoj de la legado estas ekkoni sin. Dum la legado en ni aperas emocioj kaj sentoj; iafoje ili povas esti por ni surprizo. Tamen, se ni estas konsciaj legantoj, tiaj, kiuj meditas pri tio, kion ni tralegis kaj ankaŭ pri si, ni certe komprenos, kial tiuj sentoj aperis. Travivado de emocioj dum la legado permesas elpurigi nian menson kaj profunde enrigardi en sin mem.


Alia avantaĝo estas plilarĝigado de stoko da vortoj, kiujn ni uzas, kaj pligrandigado de la lingva kaj kultura kompetencoj. Legante la beletron ni estadas kun heredaĵo de la kulturo, en kiu ni estas edukitaj, kaj tio ebligas al ni ĝuste deĉifri ĝian kodon.

Se ni legos verkojn de aŭtoroj el aliaj landoj, tiam ni havos eblecon ekkoni aliajn kulturojn kaj aliajn pensmanierojn. Tio plilarĝigas niajn horizontojn, kaj ni fariĝas pli malfermaj al aliaj homoj.”




## Klubo de bona libro

La Biblioteko de *Juna Amiko* por junuloj kaj infanoj kreskas danke al viaj proponoj. Bonvolu sendi viajn proponojn de libroj, kiuj montras pozitivajn valorojn (ekzemple toleremon, amikecon, apogon al malpli fortaj homoj), helpas kompreni vin mem kaj aliajn, kaj ebligas adaptiĝi al nia iom malgaja realeco. La proponojn kun la titolo, aŭtoro kaj mallonga rekomendo bonvolu sendi al la supra adreso, aldonante la noton: Biblioteko de *Juna Amiko*.



# Rekomendo

Por la Biblioteko de *Juna Amiko* Bebe Orozco, kuba esperantistino, ĵurnalistino kaj radioamatorino rekomendas la libron "La Luddancejo", kiun eldonis Monda Asembleo Socia (MAS). La aŭtoro de la libro, Jose de J. Campos Pacheco, estas esperantisto kaj multjara kunlaboranto de nia revuo.

La rekomendita libro *La Luddancejo* konsistas el du partoj. La unuan *Kie la nokto ne finiĝas* Jose de J. Campos Pacheco skribis en kunlaboro kun la muzikisto Ramon Gomez kaj la duan *Legendo pri Linko* helpis al li skribi David Alonso Pupo, tre talenta 17-jara junulo, kiu ekde la infaneco emis verki. *La Luddancejo* estis eldonita en la hispana kaj en Esperanto kaj estas preparita ankaŭ kiel scenaro.

La libro prezentas la vivon de junuloj el la urbo Varadero, kiuj vizitas la luddancejon. La junuloj travivas multajn aventurojn, ankaŭ la malĝojajn. Ili ne komprenas, ke alkoholismo komenciĝas jam de unu drinko, ke senproduktiva vivo ne estas valora kaj ke veran feliĉon ni ne atingas per strebado nur al ludado kaj amuzoj. Ili ankaŭ ne komprenas, ke "mensogo havas mallongajn krurojn" kaj ĉiam ĝi estas malkovrita. Tamen kiam Saulo, unu el la herooj de la libro, havis akcidenton, li malkovris solidarecon, bonkorecon kaj fratecon de siaj amikoj. Legante la libron vi ankaŭ ekscios, kiu estis Linko. La aŭtoro de la libro, Jose de J. Campos Pacheco, prezentas ĝian enhavon al junuloj en la lernejoj (vidu la suban foton), por montri al ili danĝerojn, kun kiuj ili certe renkontiĝos, sed tiam ili pli facile povos trovi ĝustan rimedon, solvon aŭ protekton.

# La konkursa tasko

**estas jena: Priskribu, kion donas al vi la legado.**

La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko "Konkurso – legendo" ĝis la 30-a de junio 2019 al la adreso Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL-50-007 Wrocław, Polska. La valorajn premiojn preparis Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).





# Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo



## Konkurso ne nur por junaj legantoj

**Ĉi-numere mi proponas viziti la Reĝlandon Belgion, aŭ simple Belgion. Ĝi estas lando de Joseph van der Vleugel, kiu helpis al mi prepari la rubrikon. Jozefo estas esperantisto, kuracisto kaj membro de la Rotary-Klubo en Loveno-la-Nova, kie li loĝas. Prenu mapon, trovu Belgion kaj per kelkaj informoj, trovitaj en interreto, konatiĝu kun ĝi. Poste tralegu la rubrikon kaj klopodu trovi sur la mapo la menciitajn lokojn – kaj fine faru la konkursajn taskojn.**

## Kio allogas min en Belgion?

Belgio (la Reĝlando Belgio) estas situita en Okcidenta Eŭropo. Ĝia nomo devenas de la latina nomo de loka grupo da keltaj triboj, kiuj loĝis en la plej norda parto de la romia Gaŭlujo, la Gallia Belgica.




Belgio havas tri oficialajn lingvojn, la nederlandan, la francan kaj la germanan. Do la nomo de la lando estas Koninkrijk België, Royaume de Belgique kaj Königreich Belgien. Tiu lingva diverseco kreis konfliktojn kaj klarigas, kial tiu federacia ŝtato estas relative komplika, ĉar ĝi entenas tri komunumojn (nederlandan, francan, germanan), tri regionojn, la flandran (57,8 %), la valonan (32,46 %) kaj la bruselan (9,74%), kvar lingvistikajn regionojn el kiuj nur Bruselo estas dulingva (N/F). Belgio estas unu el la fondintaj membroj de Eŭropa Unio. En Bruselo, la ĉefurbo de la lando, troviĝas la sidejo de Eŭropa Parlamento.



**La Komunumoj de Belgio:**
**flava - flandra,**
**ruĝa - valona,**
**blua - germanlingva.**






La belga flago estas trikolora: nigra, flava kaj ruĝa

Oni diras, ke Belgio estas lando de la plej bongustaj ĉokoladoj kaj rostitaj terpomoj, bonegaj moluskoj (*mosselen* en la nederlanda) kaj diversaj specoj da biero. Vizitante Belgion vi nepre devas gustumi lokan specialaĵon kaj do salikokajn kroketojn. En Mechelen bongustaj estas manĝaĵoj el asparagoj, en Gent vi provos gulaŝon el kokidoj (*waterzooi* en la nederlanda) kaj en Liège petu salaton kun fazeolo kaj porkflankaĵo, kiu bele nomiĝas *Salade Liègoise* en la franca.



Ĉu vi scias, ke la pralinoj estas specialaĵoj de Belgio kaj ke la unuaj en la mondo bombonujoj devenas de Bruselo danke al Jean Neuhaus, svisdevena bruselano, kiu en 1912 kreis bombonujon kaj la dolĉaĵojn nomis pralinoj. El Bruselo devenas ankaŭ ŝatataj de ĉiuj kremvafloj, kiujn dommastrinoj bakis de centoj da jaroj, uzante specialajn bakformujojn. En Bruselo oni kulturis en 1821 brusel-brasikon (*spruitjes* en la nederlanda).

El Belgio devenas ankaŭ la fama heroo de la romanoj de Agatha Christie, la detektivo Hercules Poirot. En tiu lando en 1835 Adolphe Sax konstruis saksofonon, tre popularan ĵaz-instrumenton. En Belgio naskiĝis ankaŭ la fama belga komponisto, kantisto kaj aktoro Jacques Brel.

Viziti Belgion estas vere facile, ĉar la lando posedas densan reton de altvaloraj aŭtovojoj, kiuj estas lumigitaj kaj senpagaj. Lokaj kaj internaciaj komunikiloj estas unu el la plej bonaj en Eŭropo. Belgio estas lando, kie ĉiu trovos ion por si mem, ĉar tiu lando estas profunde fiksita kun eŭropa historio kaj kun ĝiaj plej belaj landoj. Bruxelles/Brussel (Bruselo) estas la vera kultura ĉefurbo de Eŭropo, Antwerpen (Antverpeno) estas la ĉefurbo de diamantoj, Gent (Gento) allogas per flandra arkitekturo, fabela Brugge (Bruĝo), la ĉefurbo de ĉokolado, altiras per retoj de kanaloj kaj antikva arkitekturo.



**Sidejo de Belga Federacia Parlamento en Bruselo**





# Legendoj

Joseph Van der Vleugel proponas la legendon pri la fama knabo, kiu savis Bruselon kaj pri Berta, kiu ne scipovis fari ĝustan elekton.

## Simbolo de Bruselo

En la centro de la ĉefurbo de Belgio, en Bruselo, estas statueto de pisanta bubo. Ĝi troviĝas ne malproksime de la Granda Placo, ĉe la angulo de la Strato de la Vaporforno (*rue de l'étuve / stoofstraat*) kaj la Strato de la Kverko (*rue du chêne / eikstraat*). La bronza statuo estis farita en la jaro 1619 de Jerome Duquesnoy, por ornami publikan fontanon, tiel, kvazaŭ la knabo pisas. Ĉe specialaj okazaĵoj li anstataŭ akvo pisas vinon aŭ bieron.

La statuo estas mondfama ne nur pro sia petola aspekto, sed pro la legendo, kunligita kun la prezentita persono.

La legendo rakontas pri knabo, kiu savis la urbon, estingante per pisado brulantan ŝnuron de eksplodema barelo. La fama knabo nomiĝas Manneken Pis (Esperante Pisemulo (laŭvorte "Pis-virĉjo").

Certe vi ne scias, ke Manneken Pis havas multajn vestojn, probable pli ol 800 kostumojn. La unuan li ricevis en la jaro 1698. Inter la vestaro estas futbal-kompletoj, la kostumetoj de Elvis Presley kaj Mickey Mouse.

Laŭ la legendo, kiu tuŝos la dekstran brakon de tiu knabo, estos feliĉa.



## La legendo de Berta de La Roko

Berta, filino de la Sinjoro de La Roko, ne kapablis elekti iun el pluraj pretendantaj fianĉoj. Havanta esceptan belecon, ŝi devis urĝe plenumi ordonon de la maljuniĝanta patro. Li organizis turniron por elekti sian estontan bofilon. Multaj kavaliroj el la regionoj de Ardeno, de Kondruzo, de Lieĝo, de Namuro, de Heno kaj Hesbajo prezentiĝis. Inter ili estis Valerano, la plej aĝa filo de la nobelulo de Montakro kaj fianĉo de Maria de Salmo. Trafita de naskiĝanta nova sento, Valerano forlasas Marian, kiu, sciante lian preferon, same forlasis lin.

La kavaliro alfrontis siajn rivalojn ĝis la lasta batalo. Tiam prezentiĝis nigra kavaliro, kiu malgraŭ malgrandeco kaj neforteco facile venkis. Oni rapide festis la geedziĝon. Post la nupta nokto oni trovis en la ĉirkaŭfosaĵo de la kastelo de Montakro la edzinon ponardita. Pli malfrue la popolo eksciis, ke la nigra kavaliro estis Maria de la Salmo, kiu, freneza pro amareco, vendis sian animon al diablo por kapabli puni. De tiam la fantomo de Berta de La Roko vagadas malespere ĉirkaŭ la fortikaĵo dum ventegaj noktoj.

# La konkursa tasko

Redaktu 10 demandojn al la tuta teksto de *Ekkonu mian landon pere de ĝia legendo.*

Se vi ŝatas desegni aŭ pentri, sendu al ni bildo(j)n, kiu(j) bildforme prezentos la legendon. La konkursan taskon bonvolu sendi kun viaj nomo, adreso kaj indiko 'Konkurso – legendo" ĝis la 30-a de junio 2019 al la adreso Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej, ul. Kołłątaja 26A, PL- 50-007 Wrocław, Polska. La valorajn premiojn fondis la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (pole: Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej).

Mireille Grosjean

# Kiom stultan ideon mi havis... Mankas al ili logiko!

**En Kotonuo (Benino) mi vidis trinkejon, kies nomo estas “PETIT A PETIT 2”. Mi neniam trinkis ion tie, sed ĝi donas sian nomon al la strato, kaj ofte mi promenas en tiu strato.**

La oficiala lingvo en Benino estas la franca, la instruado en lernejoj kaj la administraj aferoj okazas en la franca. Paralele oni aŭdas afrikajn lingvojn.

La nomo de la trinkejo pensigis min. Kial damne ili elektis tiun nomon!

Imagu! “Petit” signifas “Malgranda, eta”. “Petit” ankaŭ signifas “minusklo” por literoj. Do “grand A” kaj “petit a”, “majuskla A” kaj “minuskla a”. Pro tio mi nomus la trinkejon aŭ PETIT A PETIT B, aŭ PETIT 1 PETIT 2. Tio estus logika. Sed tute ne, la lokanoj elektis la nomon “PETIT A PETIT 2”. Mankas al ili logiko!

Mi foje menciis mian miron. Miaj afrikaj amikoj ridegis.... – kaj mi petis klarigojn. Ili klarigis:

Ekzistas en alia parto de la urbo trinkejo, kies nomo estas “PETIT A PETIT”. Tio signifas: “Iom post iom”. Oni eĉ povus skribi: “PETIT-A-PETIT”.

Do vi trinku vian sukon, vian bieron iom post iom, malrapide, ĝuante ripozon en tiu trinkejo.

Venis multaj klientoj al tiu trinkejo, tiom, ke la posedanto decidis malfermi duan tian trinkejon en alia urboparto. Kaj tute logike li nomis la duan trinkejon “PETIT A PETIT 2”. Do “Iom post iom 2”.

Mi devis ridi kun miaj afrikaj amikoj. Mi devas reiri al Kotonuo, ĉar ili promesis gvidi min al la unua “PETIT A PETIT”.





# La sorĉa kanto-mondo

La rubrikon preparas Małgosia Komarnicka,
ul. Kilińskiego 14/3, PL-59-300 Lubin, *malgosia.junaamiko@gmail.com*



**Kanto akompanas nin ĉie... Ni volonte aŭskultas ĝin, ĉar ĝi helpas vidi kaj krei alimaniere la mondon, permesas revi, aŭ transdoni niajn sentojn.**

Ĝi ankaŭ helpas akiri pli bonajn rezultojn dum lernado, ĉar lernantoj, ludante, samtempe lernas, kreskigas sian emocian engaĝiĝon en la lerno-procezo. Sufiĉas nur ekkanti, kaj ili tuj memoras la kanto-vortojn. Tiumaniere la lernantoj plej bone kaj sugestie alproprigas al si la materialon de la leciono, ofte ne konsciante, ke ili ekzercas sin en fremda lingvo. La laboro kun kanto havigas ĝojon kaj kontenton al la lernantoj, kaj do ni ne malhelpu ĉi tiun agrablecon de kantado dum la Esperanto-lecionoj.

La kanton *Vent' printempa kirlas akvon* por la legantoj de *Juna Amiko* rekomendas Maria Eszes, hungara esperantistino, prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, prezidanto de Arta Rondo kaj manaĝerino de la FŐNIX-ĉambrokoruso. Ŝi amatore pentras, verkas poemojn, prozojn kaj kantas en koruso. La proponita kanto estas popola kanto, kiun esperantigis Ferenc Jáki.

## *Vent' printempa kirlas akvon*

*Vent printempa kirlas akvon*
*floreto, floreto.*
*Ĉiu bird' elektas paron*
*floreto, floreto.*
*Sed mi jam kiun elektu,*
*floreto, floreto.*
*Vi min kaj mi vin elektu,*
*floreto, floreto.*




La kanto estas aŭdebla en la 638-a Esperanto-elsendo de Pola Radio el la 04.04.2017 ĉe:
*https://gb.ivoox.com/en/e-elsendo-04-04-2017-audios-mp3_rf_17958340_1.html*



La FŐNIX-ĉambrokoruso de la „Respekto al Komlo-Unuiĝo” estis fondita en 2011. La ĥorestrino estas Maria Csonka kaj la manaĝerino Maria Eszes.

La koruso kantas plurlingve. En ilia repertuaro estas mondaj, ekleziaj ĥormuzikoj kaj popolkantoj. Ili interalie prezentiĝis dum folkloraj festivaloj, kulturaj aranĝoj, en literaturaj kaj artaj rondoj, okaze de Zamenhof-festo, dum ekspozicioj, libroprezentadoj en Hungario kaj en multaj aliaj landoj.

Ĝia devizo estas vortoj de Miĥaelo Babits el *La dua kanto* (1928):

*„En animo de ĉiu homo estas melodio,*
*kaj sian animon aŭdas en ĉiu melodio.*
*En kies animo ĉi kanto bele sonas,*
*Ankaŭ alies kanton bela li aŭdas.”*

## Bonvolu respondi jenajn demandojn:

1. Kiu kirlas la akvon?
2. Ĉu ĉiu birdo elektas paron?
3. Kun kiu floreto estos paro?
4. Kiu esperantigis la tekston de la kanto?
5. Kiu kolektis la tekston?
6. Desegnu la floreton laŭ via imagpovo.

La popolkanton kolektis en Moldavio en 1930 Sándor Veress, kiu estis komponisto, muzikinstruisto, popolmuzika esploristo.

Li estis la spirita heredanto de la mond-famaj hungaraj komponistoj Béla Bartók kaj Zoltán Kodály. Béla Bartók estis komponisto, pianisto kaj muziksciencisto, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la klasika muziko en la 20-a jarcento. Li reprezentis la hungaran popolon kun estimo al aliaj popoloj kaj deziris fratiĝon inter la popoloj. En tiu ideo kreiĝis la fama verko “Cantata Profana” en 1930. Zoltán Kodály estis esploranto de la hungara kaj mezeŭropa popola muziko. Li klopodis krei hungaran muzik-kulturon. Laŭ li tre grave estis eduki muzike infanojn. Jen kelkaj citaĵoj el liaj verkoj:

*La muziko estas nutraĵo de la animo, kiu estas anstataŭigebla per nenio alia.*

*Plena anima vivo ne ekzistas sen muziko.*

*Muzikon oni devas instrui jam en la infanĝardenoj.*

Viajn respondojn interrete sendu al mi por ricevi valorajn premiojn, kiujn dediĉis pola organizo Eŭropa Centro de Interkultura Edukado *www.ecem.com.pl*

## Kantu kaj lernu!

Bonvolu sendi al mi viajn proponojn de viaj naciaj kantoj, por ke la legantoj de *Juna Amiko* havu la eblecon ekkoni belajn kantojn el la tuta mondo!



Rubrikestro:
Elena Nadikova,
Esperanto-klubo “Betuleto”
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio
*lena_espero@mail.ru*




# Esperanto-Numismatika Asocio

## Saluton, karaj legantoj!

**Vi certe scias, ke Esperantujo estas granda komunumo. Ĝi unuigas homojn pere de nia internacia lingvo. Esperantistoj ŝatas kaj uzas Esperanton. Tamen ne nur Esperanto unuigas homojn.**




En de Esperantujo ekzistas multaj fakaj asocioj kaj grupoj. Tie kunas diversaj fakuloj. Ekzemple kuracistoj, fervojistoj, ĵurnalistoj, filatelistoj kaj multaj-multaj aliaj. Hodiaŭ ni rakontos al vi pri unu el tiuj fakgrupoj.

Temas pri ENA – **E**speranto-**N**umismatika **A**socio. Ĝi estas juna fakgrupo. ENA fondiĝis en 2013. Ĝi estas ununura asocio pri numismatiko en Esperantujo.

La vorto “numismatiko” havas du sencojn. La unua signifas helpan historian sciencon/fakon. Ĝi naskiĝis el amatora kolektado de moneroj. La latina vorto “numisma” signifas “monero”. Kolektado kiel hobio aperis dum la renesanca epoko en Italio en la 14-a kaj 15-a jarcentoj. Tiam aperis la unuaj priskriboj de moneroj kaj la unuaj privataj kolektoj. Poste kolektado de moneroj disvastiĝis en Eŭropo. Sistema priskribo de moneroj komenciĝis en la 18-a jarcento. Tiam aperis ankaŭ la unuaj katalogoj.

Krome numismatiko signifas kolektadon de moneroj kaj medaloj. ENA unuigas homojn, kiuj interesiĝas pri tiaj memoraĵoj kaj artefaktoj.

La instiga kialo por krei la asocion estis jena: Oni konstatis, ke en Esperantujo la






propra trezoro de moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ en la vasta rondo de kolektantoj. Homoj malprave supozas, ke tiuj belaĵoj kvante kaj kvalite estas tute malgravaj. Tial kreiĝis en la historio de Esperanto tute nova faka asocio. La ĉefa celo de ENA estas montri al esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke Esperantaj numismatikaĵoj estas multvaloraj artefaktoj. Necesas kolekti kaj nepre pristudi ilin! La dua celo de ENA estas kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron. Jen gravaj taskoj de ENA.

Malgraŭ la freŝdateco, la membrokvanto de ENA rapide kreskis kaj daŭre kreskas. Nur dum la unuaj kvar jaroj aperis 113 membroj el 39 landoj! Krome, en ENA membras 20 diversaj Esperantaj (kaj eĉ ne-Esperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj tra la tuta mondo.

ENA havas sendube ankaŭ signifan avantaĝon. La membreco estas absolute senpaga kaj senkosta! Ekzistas nek estraro, kaj sekve nek kasisto. Vi rajtas tuj aliĝi! Sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi" al ENA: *bert.boon@skynet.be*. Krome, ENA havas propran abunde ilustritan (nur perretan) revuon. Ĝi nomiĝas *Esperanta Numismatiko*. La revuo ekzistas nur en reta formato kaj tial estas tute senkosta! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos, kiel promesas la iniciatinto! Post aliĝo vi rajtas ankaŭ elŝuti senpage ĉiujn jam aperintajn jarkolektojn. Krome, ĉiuj aperontaj numeroj estos aŭtomate sendotaj. *Esperanta Numismatiko* aperas 4-foje jare. Vi eĉ rajtas unue peti provnumeron!

Do, karaj legantoj! Se vi ŝatas studi la Esperantan kaj homaran historiojn pere de Esperantaj moneroj kaj medaloj, bonvenon! La oficialan anoncon pri ENA vi facile trovos ankaŭ en la Jarlibro 2018 de UEA sur la paĝo 66. Krome, en la sama libreto vi trovos grandan materialon pri Esperanto ĝenerale, pri tiamaj Esperantaj monvalutoj, pri ENA detale. La artikolo sur la paĝoj 59 – 74 enhavas ankaŭ bibliografion. Kopiojn de ĉiuj jarkolektoj oni sendis kaj sendos i.a. al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, al la Biblioteko de la Vanbiervliet-fonduso en Kortrijk (Belgio) kaj al la "Hereda Biblioteko HendrikConscience" en Antverpeno (Belgio). Ili ĉiuj membras en ENA.

Ni jam diris, ke ENA havas propran revuon *Esperanta Numismatiko*. Ĝi publikigas diversajn materialojn pri numismatiko, krome pri la asocio mem. Ĉu vi volas ekzemple ekscii, kiel iĝi "ambasadoro de Esperanto kaj ENA"? Petu kaj legu la revuon! Ĉu vi volas vidi belajn medalojn pri Esperanto? Ĉu vi ŝatas ĝui rarajn monerojn? Petu kaj legu la revuon! Ĉu vi emas scii pri la aktuala valutsistemo de Esperanta Civito? Ĉu vi volas konatiĝi kun eminentuloj en Esperantujo kaj ne



nur? Ĉiam petu kaj legu la revuon! Se vi ŝatas esplori pri diversaj enigmoj, ankaŭ bonvenon al ENA! En la arkivoj de la asocio troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de Esperantaj numismatikaĵoj.




Pri ili oni scias malmulton aŭ ofte preskaŭ nenion. ENA invitas kontribui por la kompleta katalogo pere de informoj. Jam estas parte solvita la naŭa enigmo per helpo de la legantoj! Aliaj atendas siajn vicojn. Bonvenon, scivolemuloj! Jen estas inda kaj enda internacia kaj interkultura projekto, ĉu ne?




Vi povas legi ankaŭ diversajn interesajn rakontojn pri okazaĵoj koncerne al moneroj kaj monbiletoj. La revuo proponas detalan instrukcion por emisii medalojn. Ekzistas sur ĝiaj paĝoj "forumo". Tie emuloj povas interŝanĝi siajn konojn kaj spertojn pri numismatiko kaj ne nur. Scivolemuloj povas lerni pri diversaj terminoj rilate al moneroj kaj medaloj. Estas paĝoj por korespondado.

**Do, konklude, karaj legantoj!** Vivo iĝas multe pli interesa, kiam homoj havas diversajn hobiojn. Kaj pli valore estas, kiam niaj ŝatokupoj realiĝas mondskale. Ja ni havas unikan ilon por tio – la lingvon Esperanto. Ĝi sukcese agas en tiuj projektoj kiel pontolingvo. **Kuru sur tiu ponto kaj ĝuu vivon kaj Esperanton!**

Interkultura Mondo esprimas ***koran numismatikan dankon*** al sinjoro Bert Boon el Belgio, la iniciatinto de ENA kaj la ĉefredaktoro de *Esperanta Numismatiko*!

Aliĝi senpage kaj ricevi plian informon pri ENA vi povas ĉe: *bert.boon@skynet.be.*

# Maljunulino en tramo

**Murambi, nia kvartalo. En la tramo videblas multaj maljunuloj, ĉar ili ne plu havas aŭtomobilon kaj marŝas malfacile.**



Iam maljuna virino entramiĝis por iri al la placo Katemba, portante dikan sakon, kiu pendis ĉe ŝia ŝultro.

Ŝi havis mienon malgajan, vere malgajan. Iu ŝtelisto observis ŝin kaj alproksimiĝis iom-post-iome. Kaj kiam la tramo haltis, li ekkaptis la sakon de la sinjorino, elsaltis el la tramo kaj forkuris. Neniu povis lin kapti: li kuris tro rapide.



La vojaĝantoj sin turnis al la majunulino por konsoli ŝin. Sed, … – Ŝi ekridegis!

Ŝi ne povis ĉesigi la ridadon! La homoj kredis, ke temas pri nervo-krizo.

Sed ne, nenio grava. Ĝi ne estis nervo-krizo! Post kelkaj minutoj la sinjorino kvietiĝis kaj klarigis: "Vi ne komprenas! Mi estis iranta al mia ĝardeno kaj en mia sako estis mia mortinta kato. Mi volis enterigi ĝin. Kompatinda besto!"

**Honoré Sebuhoro**

Renée Triolle

# Virinoj inventis

**Ni kutimas konsideri, ke virinoj ne estas sciencistoj kaj efektive nemultaj inventaĵoj ŝuldiĝas al virinoj. En tiu ĉi artikolo ni nin turnas al virinoj, kiuj inventis aĵojn por faciligi al si la vivon.**

## Manĝilar-lavmaŝino 1886

Joséphine Cochrane (1839-1913) estis bonhava burĝino, kiu ofte invitis gastojn por manĝoj aŭ bankedoj, kaj ŝi konstatis, ke estas longtempa lavado poste. Ŝi do elpensis korbojn, en kiujn ŝi starigis telerojn kaj pladojn, por ke ili ne rompiĝu. Ŝi unue fabrikis ilin por amikinoj, sed dum la ekspozicio en Ĉikago en 1893 ŝi prezentis sian inventaĵon, patentitan en 1914, kaj poste aĉetitan de Miele en 1929. La ĉefa problemo estis varmigi akvon.




## Kaf-filtrilo

Se niaj avinoj filtris kafon per ŝtrumpo, Melitta Bentz (1875-1950) ne kontentis pri la gusto de la kafo, ofte tro amara. Ŝi do pripensis, uzis unue sorbopaperon de siaj gefiloj, ĝis 1908, kiam ŝi trovis la nunan kaffiltrilon, prezentis ĝin dum la foiro de Leipzig (Germanio) kaj ŝi kreis sian propran entreprenon.




## Beb-transportilo

Konstatinte, ke afrikaj virinoj konstante portas sian bebon sur la dorso, Smyli Ann Moore komercigis beb-transportilon en 1969, kiu similas al sako por porti bebon sur si, kiam ĉaro estas maloportuna. Ni rimarku, ke pli kaj pli da eŭropaj patrinoj nun simple kopias afrikaninojn, vidante sur le reto kiel nodi ŝtofon por porti sian bebon sur sia ventro aŭ dorso!




## Pistuko

Sed bebo ne nur transportiĝas; ĝi ankaŭ pisas. Ofte maloportune, kiam vi tenas bebon sur viaj genuoj! Tiel Marion Donovan (1917-1998) inventis en 1949 netralasivan kalsoneton el plastaĵo kaj kreis sian entreprenon.

Sed tio ne sufiĉis; en 1950 Valérie Hunter Goldon (1921-2016) inventis forĵeteblan pistukon, kiu konsistis el 75 ĝis 95% de plastaĵoj kaj petrokemiaĵoj. Tre bona aĵo,



kiun rapide adoptis ĉiuj patrinoj de la mondo. Mi memoras indianinojn en natura parko Josemite en Usono, kiuj portis surdorse la bebon laŭ kutima portilo por plezurigi la turistojn, sed la bebo surhavis forĵeteblan pistukon. Oni kalkulis, ke dum sia vivo bebo uzas 3800 pecojn; tio kostas 1000 eŭrojn, sed ĉefe poluos dum jarcentoj (obligu laŭ la nombro de beboj...). La entrepreno Pampers reaĉetis la patenton kaj la nomo iĝis komuna en diversaj lingvoj. Oni konstatis, ke tiuj pistukoj faciligas vivon de la gepatroj, kiuj ne rapidas eduki la infanon pisi kaj feki ne en la tukon, sed en pispoton. Do venis la ideo kombini la praajn ŝtofajn pistukojn, kiujn oni lavis, kun la komplete forĵeteblaj, kaj tiel oni nun ŝparas kaj ĉefe malpli poluas.




## Kio pri ludiloj?

La tutmonde fama pupo Barbie naskiĝis en 1959 en la kapo de Ruth Hangler. En 1997 jam estis vendita unu miliardo da ekzempleroj, sed feministoj mobiliziĝis kontraŭ tiu ŝablono de virino (blondulino, maldika, kun belaj mamoj kaj mallarĝa talio). Sekve la firmao produktis knabon en 2015 kaj aliajn modelojn, i.a iom diketan pupon por adaptiĝi al la merkato.



## Monopoly/Monopolo

La ludo inventita de Elizabeth Magie en 1903. Tipe kapitalisma ludo, kie necesas aĉeti kaj revendi bienojn por riĉiĝi. Sed tiu ludo, revendita al Charles Darrow en 1931 tiom populariĝis tra la mondo, ke ĝi ekzistas en 43 lingvoj kaj proponas aĉeti bienojn en diversaj urboj per diversaj valutoj, kaj do ĉiuj povas alpropri gi la ludon. Mi memoras pri la skandalo, kiam aperis la versio "Marseille/Marsejlo", ĉar iuj protestis pri la senvalorigo de domoj, ekzemple sur la populara strato Canebière, al kio la iniciintoj argumentis, ke ili kontrolis la prezojn de la merkato antaŭ ol eldoni la ludon...

En venontnumera artikolo ni vidos, ke virinoj ne nur inventis por si, sed ankaŭ kontribuis al konstruo de pontoj aŭ armiloj!

MONOPOLO
La Ludo pri la Komercado de Propraĵo

Somera Esperanto-Studado
SES
ses.ikso.net

Michal Grodza

# Kion ni faru somere? Ni iru al SES!

**Ĉiusomere esperantistoj el pluraj landoj kunvenas kaj amuziĝas dum unu semajno en Slovakio, lando meze de Eŭropo. Ĉu vi interesiĝas pri tio kion ili faras tie? Lasu min rakonti al vi…**

Proksimume 180-250 homoj el 25 landoj renkontiĝas kutime en SES – Somera Esperanto-Studado, kiu okazas ĉiujare en diversaj slovakaj urboj. Ĉu ili ĉiuj konas unu la alian? Fakte ne! Okazas ofte, ke kelkaj esperantistoj jam renkontiĝis dum pasintaj aranĝoj kaj konas unu la aliajn; tamen la plejmulto el ili amikiĝas dum SES pro tio, ke ilia komuna pasio estas lernado de Esperanto! Kaj la plej ŝatata metodo por lerni aŭ praktiki ĝin estas lerni amuziĝante kaj parolante al aliaj Esperant-emuloj.

Antaŭ la evento partoprenantoj estas disdividitaj en kurs-grupojn laŭ sia nivelo. Do dum la aranĝo ĉiu estas instruata de sperta Esperanto-instruisto en popra nivel-grupo. La aĝo en SES ne estas iel ajn limigita – oni havas grupojn de 9-jaraj ĝis 90-jaraj homoj! Ĉiutage vi estas instigata paroli nur en Esperanto – ekde via vekiĝo ĝis via dormado. Kutime la partoprenantoj komencas la tagon babilante dum komuna matenmanĝo, sekvata de antaŭtagmezaj kursoj fare de geinstruistoj. Tio estas la formala instruado, sed ne pensu, ke la tago finiĝas tiam! La posttagmeza programo estas eĉ pli interesa kaj ĝi donas spacon por partoprenanto-gviditaj ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj aŭ laborgrupoj. Vi povas aliĝi aŭ simple ripozi en hamako, perdiĝi en la stratoj de la urbo aŭ babili kun iu ajn. La vespera programo estas la plej ŝatata, ĉar tiam oni kutime dancas, kantas, spektas teatraĵojn, ludas, aŭ manĝas el internaciaj tabloj! Dum unu vespero anoj de ĉiuj nacioj prezentas sian kulturon. Kaj ankaŭ per tiu neformala programo oni lernas multe, eble eĉ pli multe ol dum matenaj kursoj, ĉar oni tiam sociumas kaj parolas, uzante Esperanton en praktiko! Post unu semajno oni povas plibonigi sian Esperanton, renkonti novajn amikojn kaj eĉ iom ekskursi en la ĉirkaŭaĵon. Se vi ne havas planon por somero, aliĝu – vi ne bedaŭros!



La grupo A2, fine de SES, kun diplomoj enmane.

PS: Krom SES ĉi-jare okazos paralele kun instruado la unua "kodum-maratono" en Esperantujo, Somera Esperanto-Programado (SEP). Diversaj esperantistoj-programistoj renkontiĝos kaj dum la tuta semajno programos, aspektigos, verkos kodojn ktp.

# Krucenigmo pri Serbio

La rubrikon prizorgas: Stefan MacGill

**Jen enigmeto, kiu rilatas al la teksto de la posta artikolo.**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 |
| 6 | | | | |
| 7 | | | | |
| 8 | | | 9 | |
| 10 | | 11 | | |
| 12 | | | 13 | |
| 14 | | | | |
| | 15 | | | |

(R = uzu nur la radikon)

## Horizontale →

1. La urbo en Serbio, kie okazos Renkontitiĝo por instruistoj, kiuj parolas Esperanton. (5)

6. Substanco ekstraktata el semoj, trovebla en terpomoj kaj aliaj energidonaj legomoj (5)

7. La ĉefurbo de Ĉinio (R 5)

8. Fragmento (sufikso 2)

9. Far' (R 2)

10. Rand' "Tie antaŭ ni estas la muro ĉe la land___o". (3 R)

12. Vojaĝ-komence. '_____ ni konstatis, ke ni forgesis nian kompason.' (5)

14. Prilaboras ledon. (5)

15. Mallonga skribo, eble por ne forgesi ion. (4)

## Vertikale ↓

1. Malgranda kapkovraĵ' (6)

2. "Mi ŝatas la _________ kontinenton." En la suda parto troviĝas 14 landoj, la plej granda Brazilo, en la norda parto estas nur du, el kiu Kanado estas la plej granda.

3. Pagil' (3 R)

4. "Jen du fruktoj, unu estas pomo, la _____ estas piro." (4)

5. La renkontiĝo en Serbio, kiu okazos en julio de la 13a ĝis la 20a estas la _________de ILEI.(8)

11. Loko sub la tero de kie oni elprenas mineralojn. (4)

13. Besto kutime griza kun pinta nazo kaj longa vosto, kiu ofte loĝas en defluejo (R 3)

## Solvo de la enigmo

**el la antaŭa numero →**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| S | I | D | A | 6 |
| I | R | A | N | T |
| T | E | N | T | A |
| U | | K | E | R |
| A | B | O | N | O |
| S | A | N | O | s |

Padojica Petroviĉ:

# Serbio, la kongreslando de ILEI

**En suda Eŭropo, sur la Balkana Duoninsulo, troviĝas malgranda lando Serbio, kun riĉa historio, abunda kultura heredaĵo, pitoreska naturo kaj gastamaj homoj.**

La serba ŝtato unue aperis en la 7-a jarcento, fortiĝis tra la mezepoko, longe sklavis sub la Otomana (turka) Imperio kaj renaskiĝis kiel moderna reĝlando post la liberiĝo antaŭ ducent jaroj. Serbio estis parto de eksa Jugoslavio kaj nun ĝi estas memstara respubliko.

La etnan diversecon de la lando spegulas la bunta folkloro kaj varia kuirarto kun gustoj kaj aromoj el diversaj lokaj kaj najbaraj gastronomioj. Vizitantojn de Serbio altiras arkeologiaj trovejoj de restadejoj de prahistoria homo kaj palacoj de romaj imperiestroj naskitaj sur ĉi tiu teritorio. Antikvaj kaj mezepokaj fortikaĵoj kaj perloj de mezepoka serba arkitekturo kaj pentroarto – preĝejoj kaj monakejoj kun admirindaj ikonoj, freskoj kaj mane skribitaj kaj ilustritaj libroj – kaptas la atenton de ŝatantoj de tradiciaj kulturaj valoroj. La spirhaltiga beleco de pejzaĝoj, kanjonoj kaj karstaj kavernoj restas longe en la memoro.

La nuntempan kulturan scenejon de Serbio famigas, interalie, muzikaj eventoj Exit (modernmuzika festivalo en la spacoj de Petro-varadina fortikaĵo apud Novi Sad), BEMUS (festivalo de klasika muziko en Beogrado) kaj Niŝvil (ĵaz-festivalo en Niŝ). La Beograda Internacia Teatra Festivalo (Bitef) sekvas la avangardajn teatrajn fluojn el la tuta mondo. La internaciaj filmfestivaloj FEST kaj Kustendorf venigas en Serbion mondskale rekonitajn ĉefverkojn de filmarto kaj ties kreantojn.

Eminentaj serbaj kulturkreantoj (filmisto Emir Kusturica, violonistoj Stevan Milenkoviĉ kaj Nemanja Raduloviĉ, artistino de spektakloj Marina Abramoviĉ, por mencii nur kelkajn) kaj elstaraj sportistoj (Novak Djokoviĉ, Ana Ivanoviĉ, Ivana Ŝpanoviĉ, Vlade Divac, Nikola Jokiĉ) aldoniĝas al la listo de famaj serbaj sciencistoj, inventistoj kaj verkistoj, kiaj estis Nikola Tesla, Mihajlo Pupin, Milutin Milankoviĉ, la komponisto de korusaj kantoj Stevan Mokranjac, la nobelpremiito Ivo Andriĉ, la matematikistino Mileva Mariĉ Einstein – edzino de Albert Einstein – kaj aliaj.

Serbio tra jardekoj gastigis Universalan Kongreson de Esperanto (UK), Internacian Junularan Kongreson (IJK), Kongresojn de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), internaciajn seminariojn, lingvan festivalon kaj aliajn Esperanto-movadajn eventojn. Ĉi-jare en ĝia urbo Ĉaĉak okazos la 52-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), inter la 13-a kaj 20-a de julio.



Turisma organizaĵo Ĉaĉak

## Serba popola fablo:

# Malfideleco pereigas

Melo kaj vulpo ekiris ĉasi kune. La vulpo demandis la melon:
– Kiom da lertoj vi konas ?
– Tri – respondis la melo.
– Mi konas sepdek sep – fanfaronis la vulpo.

Survoje ili trovis feran kaptilon kun logviando en ĝi. Ili provis manĝi la viandon sed ne kaptiĝi. Tamen la kaptilo fermiĝis kaj premis piedon de la vulpo.
– Kion mi faru, melo mia? – helpopetis la vulpo. La melo konsilis:
– Kiam venos la ĉasisto por kontroli la kaptilon, vi ŝajnigu vin morta. Vidante tion li formetos la pafilon kaj malfermos la kaptilon. Tiam vi povos fuĝi.

Tiel okazis. Post mateniĝo, la ĉasisto ekiris kolekti la predon el kaptiloj. Li trovis senmovan vulpon kaj piedpuŝis ĝin, sed ĝi ne reagis. Li kredis ĝin morta, formetis la pafilon, malfermis la kaptilon kaj la vulpo fuĝis.
– Bonan lerton ni montris – diris la vulpo kiam ili rekunvenis por daŭrigi la ĉasadon.
– Jes, bonan – konsentis la melo.
Ili trovis novan kaptilon kun viando kaj denove la vulpo kaptiĝis. Denove ĝi petis konsilon de la melo, kiu diris:
– Nun petolu antaŭ la ĉasisto, ŝajnigu vin karesema kaj ne sovaĝa. Li volos liberigi vin kaj porti hejmen kiel hejmbeston, sed vi uzu la ŝancon kaj fuĝu.

Tiel okazis kaj la vulpo denove liberiĝis. La trian fojon la melo estis malbonŝanca kaj kaptiĝis. Ĝi petis la vulpon:
– Mi donis al vi du el miaj tri lertoj por liberigi vin. Nun donu vi al mi unu el viaj sepdek sep lertoj por savi min.
La vulpo respondis:
– Mi havas nenion por vi; miaj lertoj estas nur miaj.



– Bone, – diris la melo – mi havas ankoraŭ unu lerton, sed mi ne certas ĉu ĝi helpos. Proksimiĝu al mi, ke ni kisu unu la alian por adiaŭo.

La vulpo proksimiĝis kaj la melo mordkaptis ĝin ĉe la kolo. Vane la vulpo plorpetis, la melo ne volis liberigi ĝin. Kiam venis la ĉasisto por kolekti la predon, li alparolis la melon: – Tenu ĝin, melo bravulo, kaj mi donas al vi la promeson, ke mi liberigos vin. Vere la ĉasisto liberigis la melon kaj portis la vulpon hejmen kiel ĉasaĵon.

## La mondo tra infanaj okuloj:

# Krajono skribas per koro



**Infanaj diraĵoj pri aferoj ĉirkaŭ ili, kolektitaj dum psikologiaj testoj kaj eldonitaj libroforme:**

**Plumo kaj krajono:**
– La plumo skribas per inko kaj la krajono per koro.
– Pli bonas la krajono, ĉar se oni rompas la krajonon, oni gajnas du krajojnojn, sed se oni rompas la fontplumon, oni gajnas batpunon.

**Pordo kaj fenestro:**
– Ili malsamas, ĉar en la fenestro estas ĉielo kaj en la pordo ne estas.
– Tra la pordo eniras homoj, kaj tra la fenestro eniras nokto.

**Soldato:**
– La soldato estas vivanta estaĵo en armeo.
– La soldato ekzistas por marŝi kaj por ke estu milito.

**Kapo:**
– La kapo de bruto estas longaĵo sur la besto. La kapo de homo estas rondaĵo sur la homo.
– La kapo estas ilo por pensado.
– La kapo servas por parolo. Tie la vortoj transformiĝas en frazojn.

**Surprizo:**
– Tio estas, kiam vi subite surpriziĝas kaj nur ekkrias hu!
– Kiam vi volas sidi sur seĝon, sed iu eltiras ĝin.
– Kiam vi volas manĝi kukojn, sed formanĝis ilin diversaj hejmanoj.



# Landaj Reprezentantoj – Perantoj de *Juna Amiko*

**Aŭstralio:** Aŭstralia Esperanto-Asocio, G.P.O. Box 2122 Melbourne 3001; *info@esperanto.org.au.* **Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg; *aon.913548977@aon.at.* **Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2000 Antwerpen; *financoj@fel.esperanto.be.* **Brazilo:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Bl. P 36, Ed. Venâncio III, sala 303, BR 70393-902 Brasília-DF; *belabutiko@esperanto.org.br.* **Britio:** Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Rd, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE; *eab@esperanto.org.uk.* **Bulgario:** Mariana P. Evlogieva, PK 973, BG-1000 Sofia; *mrvp@interpres.org; ilei@espereto.com.* **Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-290 01 Poděbrady III.; *polnickypavel@seznam.cz; cea.polnicky@quick.cz.* **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla 231 Curico; *strigo@esperanto.cl.* **Ĉinio:** Gong Xiaofeng, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, Nanchang, CN-330031; *arko.gong@qq.com.* **Danio:** Arne Casper, Bryggervangen 70 4 tv, DK-2100 København; *arnecasper@yahoo.com.* **Estonio:** Ahto Siimson, Russa tee 2, Liu, Audru vald, EE-88302 Pärnumaa; *ahto.siimson@esperanto.ee.* **Finnlando:** Sylvia Hämäläinen, F.E.Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere; *sylvia.h@kolumbus.fi.* **Francio:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis, rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris; *esperanto-france@esperanto.org.net.* **Germanio:** Esperanto-Buchversand, Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, DE-55129 Mainz; *wolfgang.schwanzer@esperanto.de.* **Germanio:** Zsófia Kóródy, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz; *zsofia.korody@esperanto.de.* **Hispanio:** Pedro Garrote, Apartado 119 Esperanto, ES-47080 Valladolid. **Hispanio:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell. **Hungario:** HEA, Thököly út 58-60, II/209, HU-1146 Budapest; *hungario@gmail.com, www.esperantohea.hu*. HEA vendas surloke unuopajn numerojn por la kuranta jaro po 500 ft., duono de la kutima abonprezo. Plia peranto: Boris Arrate Veranes, Emma u. 3a, HU-2030 Érd, Hungary; *simio_2004@yahoo.es*. **Islando:** Islanda Esperanto-Asocio, Pósthólf 1081, Skolavorðustigur 6B, IS-101 Reykjavík; *esperanto@isl.is.* **Israelo:** Gian Piero Savio, Rehov Menora 13/4, IL-5349007 Givatajim; *saviogp@netvision.net.il; esperantisto@live.com.* **Italio:** Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43122 Parma; *silkovojo@aliceposta.it.* **Japanio:** Japana Esperanto-Instituto, Japana filio de ILE, JP-162-0042 Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3; *esperanto@jei.or.jp.* **Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb; *marija@hes-keu.hr.* **Kubo:** Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 5120, CU-10500 La Habana 2. **Litovio:** Litovia Esperanto-Asocio, ab/k 167, LT-3000 Kaunas; *irenaa@takas.lt.* **Norvegio:** Anne Karin Bondhus, Morenefaret 8 A, NO-4340 Bryne; *akbondhus@jkn.no.* **Nov-Zelando:** David Dewar, PO Box 35849, Browns Bay, Auckland 0753; *gddewar@ihug.co.nz.* **Pakistano:** Jawaid Eahsan, P.O. Box 26, PK-60000 Multan. **Pollando:** Magdalena Tatara, Grzegorzecka 74/4, PL-31-559 KRAKÓW; *mtatara@gmail.com.* **Portugalio:** Portugala Esperanto-Asocio, Rua Dr. Joao Couto 6. R/C A, PT-1500 Lisboa; *asocio@esperanto.pt.* **Rumanio:** Ioan Crâncău, B-dul Bucureşti 5/53, RO-430281 Baia Mare. **Rusio:** Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad; *sezonoj@mail.ru.* **Serbio:** Zoran Ĉiriĉ, Branka Miljkoviĉa 14, RS-18000 Niŝ; *zciric2@gmail.com*. **Slovakio:** Peter Baláž, Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske; *petro@ikso.net*. **Slovenio:** Višnja Branković, Via Parini 5 IT-34 129 Trieste. **Sud-Afriko:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill 3, Bower Road, ZA-7800 Wynberg. **Svedio:** Leif Holmlund, Kågevägen 40 B lgh 1303, SE-931 38 Skellefteå; *leif.holmlund@telia.com.* **Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedom 6, CH-4224 Nenzlingen; *ch_scheidegger@bluewin.ch.* **Tajvano:** Reza Kheirkhah, No. 105, Chung Ching Road, Pingtung, 900-73; *rezamenhof@yahoo.com.* **Togo:** Koffi Gbeglo, B. P. 13169, Lome; *esp.togo@cafe.tg.* **Usono:** Esperanto-USA, 1500 Park Av #134, Emeryville CA 94608; *eusa@esperanto-usa.org.* **TUTA MONDO:** Abonservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; *uea@uea.org.* **Mendojn eblas sendi ankaŭ al** *ilei.oficejo@gmail.com.*

# SUPERNATURA LERNEJO

